

LE MONDE

diplomatique en Esperanto

La 22-an de januaro 2009 - Le Monde diplomatique en Esperanto <http://eo.mondediplo.com> kaj Monda Asembleo Socia (MAS) <http://mas-eo.org>

ĈAR LA MONDA Socia Forumo 2009 okazas en Belemo, Amazonio, do en regiono kie diversaj indiĝenaj popoloj kaj triboj estas minacataj de perdo de sia kulturo kaj eĉ de sia vivo, ni Esperantigis kaj prezentas ĉi tie la tekston kiu, kun la aŭtoritato de la Unuiĝintaj Nacioj, formulas iliajn rajtojn.

Kvankam la ekzisto de tiu teksto mem ne niel garantias la praktikan realigon de tiuj rajtoj, kiu fareblas nur de konsciaj, rezistantaj kaj batalpretaj homoj mem, ĝi povas tamen apogi ilin, ĉar ĝi donas al ilia batalo la pravecon de la internacia komunumo.

Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj, 1989 (n-ro 169)

Kunvokita en Ĝenevo de la Estraro de la Internacia Labor-Oficejo, kaj tie kunveninte la 7-an de junio 1989, en sia 76-a sesio;

Notante la internaciajn normojn eldiritajn en la konvencio kaj la rekomendoj pri indiĝenaj kaj tribaj popoloj, 1957;

Memorigante la tekston de la Universala Deklaro pri Homrajtoj, de la Internacia Traktato pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, de la Internacia Traktato pri civilaj kaj politikaj rajtoj kaj de la multaj internaciaj instrumentoj koncernantaj la antaŭmalhelpon de diskriminacio;

EN TIU ĈI NUMERO

- Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj: p. 1, 7-9

- Ignacio Ramonet: Finiĝas la okcidenta superrigardo de la mondo (interparolado): p. 1-3

- Alvoko de Bamako: p. 3-7

- Lucien Sève: Ĉu reguligi la financon aŭ preterpasi la kapitalismon? - Markso kontraŭatakas: p. 9-10

- Alain Gresh: Nova mondo —Leviĝanta postusona jarcento: p. 10-11

- Jean-Marie Harribey: La forgestiaj virtoj de la nmerkata aktivado: p. 11-12.

Konsiderante ke, pro la evoluo de la internacia juro post 1957 kaj la evoluo okazinta en la situacio de la indiĝenaj kaj tribaj popoloj en ĉiuj regionoj de la mondo, necesas adopti novajn internaciajn normojn pri la demando cele al forigi la orientiĝon de la antaŭaj normoj kiuj celis asimiladon;

Notante la aspiron de la koncernaj popoloj regi siajn proprajn instituciojn, vivmanierojn kaj ekonomian disvolviĝon kaj konservi kaj disvolvi siajn identecon, lingvon kaj religion en la kadro de la ŝtatoj en kiuj ili vivas;

Notante ke, en multaj mondpartoj, tiuj

popoloj ne povas ĝui fundamentajn homrajtojn samgrade kiel la resto de la loĝantaro e la ŝtatoj en kiuj ili vivas kaj ke iliaj leĝoj, valoroj, kutimoj kaj perspektivoj ofte suferis erozion;

Atentigante pri la aparta kontribuado de la indiĝenaj kaj tribaj popoloj al la kultura diverseco kaj al la socia kaj ekologia harmonio de la homaro kaj al internaciaj kunlaborado kaj interkompreniĝo;

Notante ke la ĉi-sekvaj dispozicioj estis starigitaj kunlabore kun la Unuiĝintaj Nacioj, la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj pri Nutrado kaj Kampkulturo, de la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo kaj de la Monda Organizaĵo pri Sano kaj de la Interamerika Indiĝenika Instituto, sur la konvenaj niveloj kaj (daŭrigo paĝo 7)

Igancio Ramonet: Finiĝas la okcidenta superregado de la mondo (interparolado)

Ignacio Ramonet estis de 1991 ĝis 2008 ĉefredaktisto de la monatgazeto „Le Monde diplomatique”.

1997 li donis, per la artikolo „Malarmu la merkatojn” la fondimpulson de la internacia Attac-movado kaj 2001 li apartenis al la iniciatantoj de la unua Monda Socia Forumo en Portalegro. Tie li subskribis kune kun aliaj la „Manifeston de Portalegro” kaj jaron poste en Malio (Afriko) la „Alvokon de Bamako”.

En sia lasta libro li aperigis siajn ampleksajn diskutojn kun Fidel Castro

Dum la Roza-Luksemburg-Konferenco la 12-an de januaro 2008 li prelegis pri la nefunkciado de la „Kvara Potenco”, la gazetaro, kaj postulis pli grandajn klopodojn por konstrui rezistantajn komunikilojn por la kontraŭkapitalisma movado. Fine de tiu prelego li donis al la redaktejo de „Sand im Getriebe” jenan intervjuon

Demando: En diskut-interveno por la malcentra Monda Socia Forumo 2006 vi esprimis kune kun Samir Amin kaj François Houtard: „En la momento gravas fiaskigi la usonan militprojekton. Tio estas nepara kondiĉo por krei sufiĉan agospacon, sen kiu ĉia socia kaj demokratia progreso kaj ĉia antaŭeniro direkte al multpolusa konstruado restas vundeblaj.”

Mia unua demando: Ĉu du jarojn poste ŝanĝiĝis via analizo de la monda situacio?

Ignacio Ramonet: Estas klare, ke la analizo restas valida en siaj grandaj konturoj. Sed estas vere, ke kelkaj temoj, kiuj gravis jam tiam, sed ne estis nomitaj en tiu temaro, fariĝis nun ekstreme urĝaj.

Ekz-e ekzistas la demando de la fino de la petrolepoko kaj pro tio la demando de la bazaj konturoj de energi-provizado - nun unu el la ĉefaj demandoj. Ni havas petrolon

eble ankoraŭ por 40 ĝis 60 jaroj, ĝi atingos estonte do tian prezon, ke nur malmultaj landoj povas permesi al si daŭrigi energi-provizadon bazitan sur petrolo. Tio fariĝas do strategia demando, oni vidas tion ĉe la eventoj de la lastaj jaroj. Ankaŭ la milita dominado de la mondo fare de Usono estas esence determinata de la dispono je petrolo. Usono estas pro petrolo en Proksim-Oriento kaj en Afriko, ĝi disputas kun Venezuelo kaj kun Rusio ĝuste pro ĝi. Ekzistas la danĝero, ke estonte okazos pliaj militoj pro petrolo.

Dua temo, kiun ni jam konsciis, sed ne nomis, estas la ekonomia krizo. Ni havas la problemon de la sekvoj de la klimatvarmigo, kiu evoluis multe pli rapide ol antaŭvidite. Tio devigas al radikala repensado pri energiprovizado, kompreneble en direkto al novigeblaj energioj, sed en kelkaj landoj ankaŭ direkte al kernenergio, kun ĉiuj danĝeroj rezultantaj el tio por la homaro.

Jen do du temoj kiuj koncernas la tutan homaron.

Trie ni vidas la rapidegan supreniron de kelkaj landoj de la Sudo, kun sekvoj kiujn antaŭ kelkaj jaroj ankoraŭ oni tute ne kapablis imagi: Ekzemple la supreniro de Barato kaj Ĉinio kun pli ol triono de la monda loĝantaro, sed ankaŭ de Brazilo, Sud-Afriko kaj Rusio. La ekonomia pezo de tiuj landoj kune, kiel motoro de la monda ekonomio, estas intertempe pli granda ol ekz-e la pezo de Usono. Intertempe tiuj landoj estas konstruantaj ŝtat-fondusojn, kiuj kapablos agi en la kerno de la tutmondigo. Pro tio, mia opinio baldaŭ aperos la temo de reveno de protektismo. Se en tiuj landoj - Ĉinio kaj Barato, sed ankaŭ Sud-Koreio, Malajzio, Tajlando aŭ Indonezio, kiuj fariĝis la monda fabriko, apenaŭ io ankoraŭ eksportebblas, kvankam ili estas la novaj ekonomiaj merkatoj kiuj povus ion aĉeti, kio tiam fariĝos la industrioj en la evoluintaj landoj? La germanaj eksportoj estas ja tre altaj, sed ili direktiĝas ĉefe al Rusio - kun ties aparta strukturo. Nia opinio, la temo de protektismo aperos baldaŭ, ĉar la evoluintaj landoj baros la aliron al siaj merkatoj por produktoj de la periferio.

Kvare temas pri danĝero, pri kiu ni de longe jam sciis, kiun ni tamen ne taksis tiom urĝa, sed kiu nun povas efektive aperi: la usona ekonomia krizo, la bankroto ĉe la borso de Usono. La hipoteka krizo, la subprime-krizo havas sekvojn por la plej grandaj usonaj bankoj, kiuj estas savotaj de ŝtat-fondusoj, speciale de arabaj landoj. Ankaŭ eŭropaj bankoj, ekz-e en Germanio kaj Svislando, estas tuŝitaj de tio. Leviĝas la demando, ĉu rezultos granda ekonomia krizo. Ĉar ekzistas la danĝero de granda recesio en la evoluintaj landoj. Ĉu Ĉinio, Barato kaj aliaj en tiu situacio povas fariĝi la motoro de la mondekonomio, se la usona motoro kolapsas? Se tio ne sukcesas, tio signifas monda ekonomia krizo.¹

¹ Rimarkindas, ke Ramonet esprimas tiun

Tio estis kvar novaj aspektoj.

Reen al la temoj antaŭe analizitaj:

Sur milita kampo Usono estas kompreneble daŭre la ege plej granda potenco, sed la Proksim-Oriento montris, ke ĝia milita potenco ne ebligas al ĝi gajni malsimetriajn militojn: Usono ne gajnis la Irak-militon. Eble ĝi sukcesos bridi Irakon, sed oni ne scias kiel tio finiĝos. Ĝi ne povas gajni la militon en Afganio. Israelo ne povas gajni la militon kontraŭ la palestinanoj, ĉiukaze ne sur milita nivelo, eventuale sur politika nivelo. Videblas do en tiu regiono, ke la milita supereco ne transformeblas en militan venkon. El tiu situacio eblas tiri du konsekvencojn: Usono ne enmarŝos en Iranon, eble bombos ĝin, sed ne enmarŝos, kiel en Irako, per terenaj trupoj. Ĝi ne havas la rimedojn por tio.

Due, Usono venos el tiuj militaj konfliktoj elĉerpante kaj por iom da tempo ne povos permesi al si gravajn militajn aventurojn. Des pli ke Rusio estas ree fariĝanta grava milita potenco sur monda nivelo.² Pro tio, la milita ekvilibro, kiu estis antaŭe unupolusa, fariĝis intertempe iom multpolusa.

Demando: Antaŭ du jaroj vi formulis en kvar punktoj vizion por vere multpolusa mondo:

1. „Eŭropo ekiras la vojon de socia konstruado (...) kaj komencas definitive turni la dorson al sia imperiisma pasinteco kaj estanteco;

2. en Ĉinio venkas la «merkatsocialismo» super la iluzia misevoluo al nacia kapitalismo (...);

3. la landoj de la Sudo (popoloj kaj ŝtatoj) sukcesas konstrui komunan fronton. (...);

4. la konstruado de naciaj kaj internaciaj juraj sistemoj ligas la respekton de la nacia suvereneco (...) kun la individuaj, kolektivaj, politikaj kaj sociaj rajtoj (...).”

Ĉu tiuj kvar punktoj estas daŭre alstrebindaj, vide al la ŝanĝoj en la mondo?

Ignacio Ramonet: Tiuj kvar celoj restas daŭre validaj, sed ni povas konstati, ke la situacio, kiun ni havas hodiaŭ sur internacia nivelo, ebligis la sociajn movadojn en Latinameriko. Ĉar ni vidas, ke la sociaj movadoj povis evolui en Latinameriko interalie, ĉar Usono estis tre okupata ĉe la fronto de Proksim-Oriento kaj por la unua fojo de jarcento neglektis Latinamerikon. Kaj okazis en Latinameriko ankaŭ sufiĉe demokratiaj elektoj; progresemaj politikaj fortoj elktiĝis kaj ne estis faligeblaj, nek per puĉoj nek per usonaj intervenoj. Jen io nova en la historio de Latinameriko. Estas interesa af-

danĝeron jam en januaro 2008, antaŭ ol la krizo graviĝis ekde oktobro, kaj la Popola Banko de Ĉinio (la centra banko) avertis, la 7-an de januaro 2009, pri la verŝajneco de tutmonda recesio. -vl

² Tiu konstato konfirmiĝis poste per la milito inter Georgio kaj Rusio- vl

ero ke la fortiĝo de la sociaj movadoj okazis ne tiom en Usono, nek en Eŭropo, nek en Orient-Eŭropo, nek en la aziaj landoj, sed ĉefe en Latinameriko. Tio estas grava, ĉar ankaŭ por la internacia maldekstro, tio, kio okazas en Venezuelo kaj Bolivio kaj certgrade ankaŭ en Brazilo, estas granda kuraĝigo.

Krome, la evoluanta multpoluseco favoras la eliron de Afriko el la neeltenebla situacio en kiu ĝi troviĝis de tri aŭ kvar jarcentoj. Afriko estis sklavigita, koloniita, ĝiaj krudmaterialoj estis rabataj. Afriko estis esence dependa de la eŭropaj potencoj - ĝi estis disdividita en la Berlina Konferenco 1995 inter la koloniaj potencoj. Estas interese konstati, ke Ĉinio hodiaŭ ĉeestas en Afriko pro geopolitikaj kialoj. Vi certe rimarkigos, ke ankaŭ Ĉinio interesiĝas interalie pri la krudmaterialoj. Sed nun la afrikanoj povas elekti inter pluraj potencoj. Usono estas en Afriko pro petrolo. La fakto ke Afriko jam ne estas tiom dependa de Eŭropo, sed ankaŭ rilatas kun aliaj potencoj, donas al tiu kontinento novan politikan manovrad-kapablon, donas al Afriko pli grandan agospacon. Ni ĵus vidis, kiel en la Eŭropa-Afrika-Konferenco tiu kontinento rifuzis la postulojn de Eŭropo, ĉar ĝi havas nun aliajn eblecojn.

Le Monde diplomatique en Esperanto aperas rete (la adreson vidu piede de tiu ĉi paĝo) en respondeco de ties skipo; ĉefredaktisto: Vilhelmo Lutermano, eldonata de la Unesko-Grupo Narbona, Fount d'En Gazel, FR-11360 Embres-et-Castelmaure, kaj de la franclingva *Le Monde diplomatique*, 1, Avenue Stephen Pichon, FR-75013 Parizo.

Tiu ĉi numero aperas en ekskluziva respondeco de *Le Monde diplomatique en Esperanto* kaj de la Monda Asembleo Socia (MAS).

Enpaĝigo per OpenOffice3.0.0 sub Mandriva-Linukso 2009.0 fare de MAS.

Vi vidas do, ke al la kvar nomitaj celoj aldonendas novaj elementoj.

Demando: *Kiel la sociaj movadoj, kiel speciale la Monda Socia Forumo, povas plu evolui? Tiurilate vi esprimis en la Roza-Luksemburg-Konferenco tre kritikajn vortojn. Kiajn malhelpojn vi vidas mem?*

Ignacio Ramonet: La ĉefa malhelpo estas aktuale la nekapablo de la internaciaj sociaj movadoj trovi ian formon de retiĝo kiu ebligus al ĝi agi pli unuece. Ĉar la sociaj movadoj en la momento ne pretas meti al si celojn kiuj iru en la saman direkton, ili aperas malunuece, kaj tio malhelpas ilin transiri al nova fazo.

Ĉar la movado ja trairis plurajn fazojn:

La unua fazo konsistis en difinado de la tutmondigo. Ĉirkaŭ 1995 la movado ankoraŭ ne ekzistis, ĉar ĝi ne sciis kontraŭ kio batali. Necesis ke multaj intelektuloj kaj politikaj fortoj difinu komune la kontraŭulon, kaj la kontraŭulo estis la tutmondigo. Tiam ĝi ankoraŭ ne havis nomon.

En la dua fazo la celo estis kunigi ĉiujn kiuj - sen scii tion - batalis kontraŭ la tutmondigo, en la Sudo kiel en la Nordo. Tio estis atingita.

Sed oni havas la impreson, ke tiuj sukcesoj, speciale la fondo de la mondaj sociaj forumoj, kondukis intertempe al paralizo. La movado estas - potencie - hodiaŭ forta kiel certe neniam antaŭe, ĝi estas mondvas-te la sola iom organizita forto, kiu rezistas al la tutmondigo, sed la movado ankoraŭ ne scias kion fari per tiu forto. Oni preterlasas

eblecojn, almenaŭ mi vidas tion tiel. Tamen ni havas hodiaŭ, miaopinie, la kapablon konduki grandajn batalojn sur monda nivelo. Memoru la grandajn manifestaciojn kontraŭ la Irak-militon, entute la unuan mondvestan manifestacion. Hodiaŭ eblas nomi aliajn, tre precizajn sloganojn kontraŭ la tutmondigo. En Portalegro ni ellaboris manifeston - tio kondukis cetere al polemiko. La 12 proponojn konsentis ne ĉiuj, sed jam la granda plimulto de la organizaĵoj. Sed certaj homoj, kiuj kredas povi akapari la Mondan Socian Forumon, decidis, ke tio estus politikigo, manipulado de la Monda Socia Forumo. Nu bone, tiu demando ne stariĝas. Tamen estas fakto, ke tiel ĝi ne plu funkcias: Ekzistas momento, en kiu la sociaj movadoj devas ĉesi estu nur - pruvite sukcesaj - rezistmovadoj kaj devas transiri al nova stadio, al alia formo de bataloj.

Demando: *Kian rolon ludas ĉe tio la alvoko de Bamako?*

Ignacio Ramonet: Mi estis mem en Bamako kaj kune subskribis la alvokon. Jes, kompreneble, ĝi havas grandegan gravecon. Mi pensas, ke tiu alvoko daŭre restas principe grava kaj valida, ke surbaze de ĝi eblas mobilizi, sed ni devas konstati, ke ĝi ne estis subtenata de la tutaĵo de la sociaj alternativaj movadoj. Hodiaŭ mankas miaopinie la politika volo labori en direkto al komunaj celoj, kun konservado de la memstareco de la individuaj grupoj - la movado povas plu ekzisti nur kun sia multeco kaj plureco. Ĉar la ideologia ofensivo de la tutmondigo marŝas antaŭen. Ni povas konstati, ke la movado jam ne timigas la regantojn. La regantoj apenaŭ parolas ankoraŭ pri ĝi. En Francio, ekde kiam Attac enkriziĝis, la dominantaj gazetoj jam ne parolas pri Attac. Por ĝi Attac ĉesis ekzisti. Oni ankaŭ jam ne parolas pri la socia forumo. Jam ne ekzistas maltrankviliĝo. Iusence tiu silento zorgigas nin, ĉar ĝi pruvigas, ke ili gajnis la batalon. Ili gajnis la batalon pro la dissplitiĝo. Pro tio mi opinias, ke la ĉefaj organizaĵoj, kiu konsistigas la Mondan Socian forumon, devas levi la demandon: Kio ni fariĝos? Kion ni faru?

La demando de transpreno de la potenco, kiun mi ĵus menciis en mia prelego, ŝajnas al mi esence grava. La tuta ĉi movado formiĝis kun la principa ideo, ke ne povas temi pri transpreno de la potenco. Mi demandas min ĉu tio restas ankoraŭ nun valida. La sperto en Latinameriko montras, ke, se oni akiras la potencon, oni povas ion realigi. Nu, en Eŭropo tio estas pli malfacilo pro la trudjako de la Eŭropa Unio; la socialdemokrata partio adoptos preskaŭ neniom el la bazaj postuloj de Attac, ĉar ĝi volas respikti la kadron de la EU.

Demando: *Ĉu vi povus diri iom pri la „socialismo de la 21-a jarcento“?*

Ignacio Ramonet: Unue, tio estas konstruejo. Chávez, kiu lanĉis tiun koncepton, eĉ ne povus mem doni difinon de la „socialismo de la 21-a jarcento“. Castro mem diras, ke hodiaŭ la socialismo troviĝas en krizo, ke ekzistas pluraj ideoj pri socialismo. Li tre konscias pri tio kaj la diskutoj kun li pri tio estis ege interesaj.

Chávez konscias, ke en politika transformprocezo venas momento, en kiu necesas transiri de praktiko al teorio, kiam oni devas do teorie prilabori la spertojn el la bataloj. Tiuj bataloj estas farataj tre konkrete, kun la kreivo kaj iniciato de la amasoj, kaj ĉe tio oni ĉerpas el diversaj bataloj kaj ties rezultoj, sed venos momento, en kiu oni devas disvolvi ankaŭ teorion. Tion faris Markso, kaj jam ekzistis la kapitalismo, kiaj Markso difinis kio estas kapitalismo. La revoluciaj movadoj ekzistis jam, sed Lenino teorie prilaboris la observojn pri tiuj bataloj, tiel kiel Markso faris pri la revolucio

de 1848 kaj pri la Pariza Komunumo. Chávez procedis same: En Latinameriko ekzistas en la momento duobla movado: Ekzistas la vikleco kaj riĉeco de la bazaj movadoj - ne en la politikaj partioj, Chávez ne estis elektita de politika partio, la socialdemokrataro estas kontraŭ li, ankaŭ Morales ne estis elektita de politika partio. Estas la bazaj organizaĵoj, la bazaj movadoj kun sia multeco, multeco de loĝkvartaloj, de la regionoj, de la agadoj, virinoj, viroj, la indiĝenoj, min siaj respektivaj postuloj. Tiuj movadoj alportas al gvidaj personuloj kiel Chávez aŭ Correa la venkon, kaj tiuj ĉi siaflanke kuniĝas kun la aktivuloj el la sociaj movadoj kaj tiel donas al la sociaj movadoj la eblecon aŭdigi sin. Tiel do realiĝis reformoj - eduksistemo, laborkondiĉoj, sansistemo... Sed venos tempo, dum kiu tio ne povas daŭre resti konstanta brikolado. Oni devas transiri al starigo de teorio: Kion ni retenos el ĉiuj ĉi spertoj? - Jen la socialismo de la 21-a jarcento.

Kiel ni agu nun? Ni detale rigardu la rezultojn de la jam dekjara bolivara revolucio, konsideru la mondan situacion, la ekologiajn, energiajn dimensiojn. Kaj kiel ni povas enigi ĉiujn ĉi elementojn en projekton, kiu ne povas esti venezuela, sed valida por la tuta homaro. Jen la socialismo de la 21-a jarcento, kiu estas nun projektata.

Tiu procezo, en kiu ni troviĝas nun, transiras la situacion, en kiu ni troviĝis kun la subkomandanto Markos. Tiu ludis ege gravan rolon en la fazo en kiu necesis konvinki pri la neceso kuniĝi de la homoj kiuj en la tuta mondo rezistis. Li donis tre gravajn impulsojn en Latinameriko - impulsoj venis ankaŭ de Bourdieu en Francio, de Chomsky, de la sindikata movado, de *Le Monde diplomatique*, de Attac...

Sed venas tempo, en kiu oni devas transiri al nova fazo. Sed se oni faras el la ideo, laŭ kiu sociaj movadoj estas la sole fareblaj, se oni faras el tio fetiĉon, tiam oni paralizas la movadon.

Kiam ekz-e estiĝas grava recesio, tiam ni havas multon por fari: Ĉar tio povas eksplodi ĉe multaj frontoj: ĉe la demando de aĉetpovo, de senlaboreco, de medio, ktp...

Demando: *Vi multe konversaciis kun Fidel Castro kaj verkis libron pri tio. Kiuj estas la spertoj de Kubo kiuj estas imitindaj, kaj kio estas evitinda?*

Ignacio Ramonet: Oni evitu troviĝi en rekta alfrontiĝo kun la ĉefa mondpotenco. Sed tio estas tre malfacila, ĉar tio dependas ne nur de Kubo, tio dependas ankaŭ de Usono. Do, evitendas blokado trudita de Usono, ĉar tio kondukas al multaj trud-situacioj kiuj tre malfaciligas la vivon.

Same evitendas la permeso de nur unu partio.³ Cetere, tiurilate iom ŝanĝiĝis la aferoj.

Imitendas aliflanke la tuta socia politiko, kiel la eduksistemo, la sansistemo - sed ne nur tie: ekzistas politiko de konstanta konsiliĝo kun la laboristoj. En tiu lando ekzistas plendungeco, kooperativoj estiĝis ĉiam libervole, speciale la kamparaj kooperativ-

³ En la diskutoj pri unueca aŭ unusola partio en Kubo oni preskaŭ ĉiam komparas la rolon de partio en Kubo kun tiu en la „demokratiaj“ landoj, kaj per tio faras konkludojn preter la realo. Kio estas preskaŭ neniam dirita kaj pri kio obŝtine silentas la amaskomunikiloj, estas la fakto, ke en Kubo la Komunista Partio ne partoprenas en la elektoj. La kandidatojn ne proponas la partio, sed la popoloj kunvenoj. Dum en Eŭropo aŭ Nordameriko la „normala“ civitano, kiu ne membras en politika partio, havas nenian influon sur la kandidatiĝo de siaj reprezentantoj, en Kubo la loĝantoj mem starigas siajn kandidatojn, sen interveno de la komunista partio aŭ de ia ajn organizaĵo. -vl

oj. Sed ĝi estas tre malgranda lando, kaj pro tio estas tre malfacile esti ekonomie memsufiĉa. Ĝi do dependis de helpo de Sovetunio kaj de la tuta socialisma tendaro. Kubo travivis tri dependecojn en sia historio: de Hispanio, poste de Usono, kaj poste - eĉ se tiu estis tute alia - de Sovetunio. Mi kredas, ke la kubanoj volas ne plu esti dependaj. Tiu, kiuj parolas nun pri dependeco de Venezuelo, ne konsideras, ke la estiĝintaj rilatoj estas tute alia: ĉar tio, kion Kubo povas doni interŝanĝe, estas tre grava - eĉ se tio ne kvantigeblas kiel petrolo, ĝi havas eble pli grandan gravecon. Vidu la sansistemon: plurcent miloj da homo povas nun ree vidi, aŭ la malanalfabetigo de milionoj da homoj: En Venezuelo jam ne ekzistas analfabetoj danke al Kubo. Vidu aliflanke al Nikaragvo, kie antaŭe ekzistis grava malanalfabetiga kampanjo: Nun tie estas ree 35 % de la homoj analfabetoj. Jen io drameca!

Tuta vico da spertoj en Kubo estu do konservataj, kaj mi pensas, ke la kubanoj mem volas konservi multon el tio, kio konsistigas ilian apartecon. Sed ekzistas la demando de la unusola partio. Kubo estas kompleksa socio, tute ne unubloka. Unu sola partio do ne kapablas reprezenti la multecon de la streboj de la kubanoj.

Demando: *Castro diras, ke la multfaceco povas trovi lokon en la unueca partio.*

Ignacio Ramonet: Jes, sed Castro diras antaŭ ĉio, ke en lando, kiu estas minacata de la unua mondpotenco, la unueco estas la plej grava, kiu konservendas. Pro tio gravegas, ke la minaco ĉesu. Se iun tagon tiu minaco jam ne ekzistas, okazos evoluo, progreso kun samtempa agnosko de la multeco de la kuba socio. Oni parolas ofte pri la ĉina modelo, sed la kubanoj ankaŭ precize observas kio evoluas en Vjetnamio.

Demando: *La potencstrukturoj inter Oriento kaj Okcidento, inter Nordo kaj Sudo ŝajnas disŝoviĝi dramece. Tion analizas marksismaj aŭtoroj kiel Giovanni Arrighi en sia nova libro „Adam Smith in Peking“. Sed pri tiu parolas intertempe ankaŭ la burĝaj komunikiloj.*

Ĉu direblas, ke, pro la ekonomia supreniro de kelkaj landoj de la Tria Mondo, precipe de Ĉinio, kaj pro la ŝanĝiĝoj en Venezuelo kaj Latinameriko, estiĝis nova ondo de emancipiĝo de la landoj de la Sudo, kiu proksimume respondas al la Bandung-movado de la 50-aj jaroj, sed ĉi-foje kun ekonomia bazo? Ĉu ne observeblas, kiel la malfavorataj homoj en la industri-landoj ĉiam pli forte defendas sin kaj kiel per tio rezultas novaj alianc-eblecoj kun la movadoj de la Sudo?

Ignacio Ramonet: Mi pensas ke tio estas bona analizo, ĉar estas klare, ke la eble unika kaj plej impresa geopolitika fenomeno estas la renaskiĝo de Ĉinio. Kiel Italio siatempe spertis resancon, renaskiĝon. Kaj tiu renaskiĝo resendas al aliaj renaskiĝoj: Koreio, Vjetnamio, Tajlando, Malajzio, Latinameriko - por la unua fojo de du jarcentoj Latinameriko spertas kreskon, pacon, demokration kaj altiĝon de la vivnivelo. Ĉiuj ĉi fenomenoj konsistigas la bazajn trajtojn de mondo, kiu estos ĉiukaze alia ol en la lasta jarcento. La landoj, kiuj de 1815 superregis la planedon, devos nun intertrakti kun samranguloj. Tio estas do la fino de la dominado de la mondo fare de la Okcidento, sed paradokse la venko de la okcidentiĝo de la mondo. Tie ni alvenis, ĉar ekz-e Ĉinio evoluas, ĉar ĝi okcidentiĝas.

Demando: *Arrighi diras fine de sia libro, ke la supreniro de Ĉinio senteble malfortigas la usonan imperiismon. Li opinias ankaŭ, ke tiu lando povus montri vojojn por solvi la ekologiajn kaj sociajn problem-*

ojn de la 21-a jarcento. Ke ankoraŭ ne klaras, ĉu tio vere okazos.

Ignacio Ramonet: Ĉinio estas hodiaŭ karakterizata de du trajtoj parte kontraŭdiraj: Unuflanke ĝi havas la plej fian, plej brutalan kapitalismon, aliflanke ĝi konservis de la komunismo la plej kritikindajn aspektojn, la unuec-partion kaj la subpremo. Kiom longe tiuj du trajtoj povos kunekzisti? Tion oni ne scias. Ĉu Ĉinio, kies ĉefa strebo estas la stabileco, povos longan tempon resti stabila? Tion mi ne kredas - ĉar tiuj du trajtoj ne povas longtempe kunvivadi. Ĉinio spertos gravajn sociajn krizojn, ĉar la malsamecoj gigantas inter la partoj de la loĝantaro, kiuj restas malriĉaj, kaj tiuj kiuj riĉigas sin, kaj la streboj estos tre diversaj. Ĉinio povus sperti la saman sorton kiel Sovetio, ĉar homoj ribelos kontraŭ la plej saviga kapitalismo kaj ĉar ankaŭ homoj ribelos kontraŭ la arĥaika komunismo. Ĉinio fascinas nin, sed ĝia sorto troviĝas sur la eĝo de tranĉilo.

Sinjoro Ramonet, ni dankas vin pro la interparolado.

La gepartneroj de la intervjuo: Marie Dominique Vernhes kaj Peter Strotmann.

El „Sand im Getriebe”, la internacia germanlingva ATTAC-cirkulero en Interreto, tradukis Vilhelmo Lutermano.

Alvoko de Bamako

1. ENKONDUKO

La sperto de pli ol kvin jaroj da mondaj konverĝoj de rezistadoj al novliberalismo ebligis krei novan kolektivajn konscion. La Mondaj Sociaj Forumoj, temaj, kontinentaj kaj naciaj kaj la Asembleo de la Mondaj Movadoj estis ties precipaj kreintoj. Kunveninte en Bamako, la 18-an de januaro 2006, antaŭ la malfermo de la Plurcentra Monda Socia Forumo, la partoprenantoj en tiu tago dediĉita al la 50-a datreveno de Bandungo esprimis sian zorgon difini pliajn celojn de disvolvado, krei ekvilibron de la socioj forigante la ekspluatadon de klaso, de sekso, de raso kaj de kasto, kaj skizi la vojon al nova fortrilato inter Sudo kaj Nordo.

La Alvoko de Bamako volas kontribui al aperigo de nova historia popola subjekto kaj solidigi la atingojn de tiuj renkontiĝoj: la principon de rajto je vivo por ĉiuj; la grandajn orientiĝojn de kunvivado en paco, justo kaj diverseco; la manierojn realigi tiujn celojn sur loka kaj sur homara skalo.

Por ke naskiĝu historia subjekto - popola, plureca kaj multpolusa - necesas difini kaj antaŭenigi alternativojn kapablajn mobilizi sociajn kaj politikajn fortojn. La radikala transformado de la kapitalisma sistemo estas la celo. Ĝia detruado de la planedo kaj de milionoj da homaj estaĵoj, la individuisma kulturo de konsumado kiu akompanas kaj nutras ĝin kaj ĝia trudado fare de imperiismaj fortoj, ne estas plu akcepteblaj, ĉar temas pri la vivo mem de la homaro. Tiaj alternativoj devas apogi sin sur la longa tradicio de la popolaj rezistadoj kaj konsideri ankaŭ la etajn paŝojn neprajn por la ĉiutaga vivo de la viktimoj.

La Alvoko de Bamako, formulita ĉirkaŭ grandaj temoj diskutitaj en komisionoj, certigas la volon:

a) konstrui internacismon de la popoloj de Sudo kaj Nordo fronte al la detruoj kaŭzataj de la diktatoreco de la financmerkatoj kaj de la nekontrolata tutmondigita dismetiĝo de la transnaciaj konzernoj;

b) konstrui la solidarecon de la popoloj de Azio, Afriko, Eŭropo kaj Ameriko fronte al la defioj de la disvolvado en la 21-a jarcento;

c) konstrui politikan, ekonomian kaj kulturalan interkonsenton alternativan al la novliberala kaj militema tutmondigo kaj al la hegemonio de Usono kaj de ĝiaj aliancanoj.

2. LA PRINCIPOJ

2.1 - Konstrui mondon bazitan sur la solidareco de la homaj estaĵoj kaj de la popoloj. Nia epoko estas dominata de trudado de konkurenco inter laboristoj, nacioj kaj popoloj. Tamen la solidarec-principo plenumis en la historio multe pli konstruivajn funkciojn por efika organizado de materiaj kaj intelektaj produktadoj. Ni volas doni al tiu principo la lokon kiun ĝi meritas kaj relatiigi tiun de la konkurenco.

2.2 - Konstrui mondon bazitan sur la plena kaj kompleta certigo de la civitanoj kaj sur la egaleco de la seksoj.

La civitano devas fariĝi lastinstanca respondeculo de la mastrumado de ĉiuj aspektoj de la socia, politika, ekonomia, kultura vivo. Tio estas la kondiĉo por aŭtenta demokratiigo. Manke de tiu, la homa estaĵo estas reduktita al surmetitaj statusoj de portanto de laborforto, de senpova spektanto fronte al decidoj de la potencoj, de konsumanto instigata al plej fiaj malŝparoj. La certigo, jure kaj fakte, de absoluta egaleco de la seksoj estas integra parto de aŭtenta demokratio. Unu el ties kondiĉoj estas la elradikigo de ĉiuj formoj, konfesatajn aŭ kaŝajn, de patriarĥeco.

2.3 - Konstrui universalan civilizacion kiu disponigas al la ĉiukampa diverseco sian plenan potencialon de krea disvolviĝo.

Laŭ la novliberalismo, la certigo de la individuo - ne de la civitano - ebligas la elfloriĝon de la plej bonaj homaj kvalitoj. La neeltenebla izoliĝo kiun la konkurenco trudas al tiu individuo en la kapitalisma sistemo produktas sian iluzion kontraŭvenon: enfermiĝon en la getoj de pseŭdaj komunumaj identecoj, plej ofte pseŭdoetnaj kaj aŭ pseŭdoreligiaj. Ni volas konstrui universalan civilizacion kiu rigardas la estonton sen paseisma nostalgio. En tiu konstruado, la civitana politika diverseco, kaj tiu de la kulturaj kaj politikaj diferencoj de la nacioj kaj popoloj, fariĝas rimedo por doni al la individuoj pli fortajn kapablojn de krea disvolviĝo.

2.4 - Konstrui la sociigon per demokratio

La novliberalaj politikoj volas trudi unu solan tipon de sociigo per la merkato, kies detruaj efikoj por la plej multaj homaj estuloj tamen ne plu necesas demonstri. La mondo kiun ni volas konceptas la sociigon kiel ĉefan produkton de senlima demokratiigo. En tiu kadro, kie la merkato havas sian spacon, sed ne la tutan spacon, la ekonomio kaj la financo estas metendaj en la servon de socio-projekto kaj ne esti submetitaj unuflanke al la postuloj de senkontrola disvolviĝo de la dominantaj kapitalo kiu favoras la apartajn interesojn de tre eta malplimulto. La radikala demokratio kiun ni volas antaŭenigi redonas ĉiujn rajtojn al la inventa imagado de politika ennovigo. Ĝi bazas la socian vivon sur la senlace produktatan kaj reproduktatan diversecon, kaj ne sur la manipulan interkonsenton kiu forviŝas la fun-damentajn debatojn kaj enfermas la disidentojn en getojn.

2.5 - Konstrui mondon bazitan sur la agnosko de la nevara statuso de la naturo kaj de la planedaj resursoj, de la agrokulturaj teroj.

La novliberala kapitalisma modelo celas submeti ĉiujn aspektojn de la socia vivo, preskaŭ senescepte, al la statuso de varo.

Privatigo kaj ekscesa varigo sekvigas senprecedencajn detruajn efikojn: detruon de la biodiverseco, ekologian minacon, malŝparon de renovigaj aŭ nerenovigaj resursoj (ĉefe petrolon kaj akvon), neniigon de kampkulturaj socioj minacataj je amasa forpeliĝo el siaj teroj. Ĉiuj ĉi kampoj estas mastrumendaj kiel komunaj havaĵoj de la homaro. En tiuj kampoj, la decido ne apartenas esence al la merkato, sed al la politikaj potencoj de la nacioj kaj popoloj.

2.6 - Konstrui mondon bazitan sur la agnosko de la nevara statuso de la kulturaj produktoj kaj de la sciencaj scioj, de edukado kaj sano.

La novliberalaj politikoj kondukas al varigo de la kulturaj produktoj kaj al privatigo de la grandaj sociaj servoj, aparte de edukado kaj sano. Tiu opcio sekvigas la amasan produktadon de malaltkvalitaj kva-zaŭkulturaj produktoj, submeton de esplorado al ekskluzivaj prioritatoj de rapida rentabilitato, la malbonigon - eĉ ekskludon - de edukado kaj sano por la popolaj klasoj. La renovigo kaj larĝigo de la publikaj servoj estas realigitaj kun la celo fortigi la kontentigon de la bezonoj kaj esencaj rajtoj je edukado, sano kaj nutraĵo.

2.7 - Antaŭenigi politikojn kiuj asociigas strikte la senliman demokratiigon, la socian progreson kaj certigon de aŭtonomeco de la nacioj kaj popoloj.

La novliberalaj politikoj neas la specifajn postulojn de socia progreso - kiuj, laŭ ili, sponte produktiĝas per la ekspansio de la merkatoj - kiel de la aŭtonomeco de la nacioj kaj popoloj, necesa por korekti la malegalecojn. En tiuj kondiĉoj, la demokratio estas senigita de ĉia efektiva enhavo, ekstreme vundebligita kaj malfortigita. Aserti la celon de aŭtenta demokratio necesigas doni al la socia progreso determinan lokon en la mastrumado de ĉiuj aspektoj de la socia, politika, ekonomia kaj kultura vivo. La diverseco de la nacioj kaj popoloj, produktita de la historio, en siaj pozitivaj aspektoj kiel en la malegalecoj kiuj akompanas ĝin, postulas la certigon de ilia aŭtonomeco. Ne ekzistas unika recepto en la politika aŭ ekonomia kampo kiu permesus eviti tiun aŭtonomecon. La celo de konstruota egaleco pasas tra la diverseco de la uzotaj rimedoj.

2.8 - Certigi la solidarecon de la popoloj de la Nordo kaj de la Sudo en la konstruado de internacismon sur antiimperiisma bazo.

La solidareco de ĉiuj popoloj - de la Nordo kaj de la Sudo - en la konstruado de universala civilizacio ne povas baziĝi sur la helpado nek sur la aserto ke ĉar ni estas ĉiuj loĝantoj de la sama planedo, eblus neglekti la intereskonfliktojn kiuj kontraŭstarigas la diversajn klasojn kaj naciojn kiuj konsistigas la realan mondon. Tiu solidareco pasas tra preterpaso de la leĝoj kaj valoroj de la kapitalismo kaj de la imperiismo kiu estas esence propra de ĝi. La regionaj organizoj de alternativa tutmondigo devas enskribi sin en la perspektivon de fortigo de la aŭtonomecon kaj de la solidareco de la nacioj kaj popoloj sur la kvin kontinentoj. Tiu perspektivo kontrastas kun tiu de la aktuale dominantaj modeloj de regionigo, konceptitaj kiel blokoj konsistigantaj la novliberalan tutmondigon. Kvindek jaroj post Bandungo, la Alvoko de Bamako esprimas ankaŭ la postulon de Bandungo de la Sudaj popoloj, viktimoj de la disvolvado de la reale ekzistanta kapitalisma tutmondigo, postulon de rekonstruado de fronto de la Sudo kapabla fiasigi la imperiismon de la dominantaj ekonomiaj potencoj kaj la militan hegemonion de Usono. Tiu kontraŭimperiisma fronto ne kontraŭstarigas la Sudajn popolojn kontraŭ tiujn de la Nordo. Male, ĝi estas la soklo de la konstruado de

tutmonda internacismon kiu asociigas ĉiujn en la konstruado de civilizacio komuna en sia diverseco.

3. CELOJ LONGTEMPAJ KAJ PROPONOJ POR TUJA AGADO

Por transiri de la kolektiva konscio al konstruado de kolektivaj, popolaj, plurecaj kaj multpolusaj agantoj, ĉiam necesas identigi precizajn temojn por formuli strategiojn kaj kontrektajn proponojn.

Tiuj temoj de la Alvoko de Bamako, pli detale prezentataj ĉi-sube, interplektiĝas, sen tamen komplete interkovriĝi, ĉar la interkonektoj inter ili estas multaj. Ili kovras la dek sekvajn kampojn, laŭ longtempaj celoj kaj proponoj de tuja agado: politika organizado de la tutmondigo; ekonomia organizado de la monda sistemo; estonto de la kamparaj socioj; konstruado de unueca fronto de laboristoj; regionigoj en servo de la popoloj; demokratia mastrumado de la socioj; egaleco de seksoj; mastrumado de la planedaj resursoj; demokratia mastrumado de la komunikiloj kaj kultura diverseco; demokratiigo de la internaciaj organizaĵoj.

La alvoko de Bamako estas invito por ĉiuj organizoj de reprezenta lukto de la grandaj plimultoj kiuj estas la laboristaj klasoj kaj la ekskluditoj de la novliberala kapitalisma sistemo, kiel por ĉiuj homoj kaj politikaj fortoj kiuj aliĝas al tiuj ĉi principoj labori kune por atingi efektivan realigon de tiuj ĉi celoj.

PROPONOJ DE LA ALVOKO DE BAMAKO

Starigo de sinergioj kaj de solidarecoj trans geografiaj kaj sektoraj limoj estas la sola maniero agi en tutmondigita mondo kaj atingi alternativojn. Laborgrupoj daŭrigos dum tiu ĉi jaro profundigi kaj konkretigi la ĉi-sube menciitajn temojn, por denove ekzameni ilin dum nova renkontiĝo kaj proponi strategiajn prioritatojn de agado.

3.1 Por multpolusa monda sistemo bazita sur paco, juro kaj intertraktado

Por elpensi autentan multpolusan mondan sistemon kiu rifuzas la usonan regadon de la planedo kaj kiu garantias ĉiujn rajtojn de la civitanoj kaj de la popoloj disponi pri siaj sortoj, necesas:

3.1.1 fortigi la kontest-movadon kontraŭ milito kaj armeaj okupadoj, kaj la solidarecon kun la popoloj luktantaj en la tiklaj punktoj de la planedoj. Tiurilate estus tre grave ke la monda manifestacio kontraŭ la milito en Irako kaj la armea ĉeesto en Afganio, planita por la 18-a kaj 19-a de marto 2006, esprimiĝu kun

— malpermeso uzi kaj fabriki atomarmilojn kaj detruado de ĉiuj ekzistantaj arsenaloj;

- malmuntado de ĉiuj militbazoj ekster la nacia teritorio, ĉefe tiu de Ĝuantanamo;

- tuja fermo de ĉiuj malliberejoj de la CIA.

3.1.2 rifuzi la intervenojn de la NATO ekster Eŭropo kaj postuli ke la eŭropaj partneroj distancigu de la usonaj preventmilitoj, kaj samtempe komenci kampanjon destinitan al ties dissolvo.

3.1.3 reaserti la solidarecon kun la popolo de Palestino kiu simbolizas la rezistadon al la monda rasdisigo esprimata de la muro kiu starigas la rompon inter "civilizacio" kaj "barbareco". Tiucele, la fortigo de la kampanjoj por postuli la forigon de la honotomuro kaj la retiriĝon de la israelaj trupoj el la okupataj teritorioj ŝajnas prioritata.

3.1.4 larĝigi la solidarec-kampanjojn kun Venezuelo kaj Bolivio, kiel lokoj de konstruado de alternativoj al novliberalismo kaj de arĥitektoj de latinamerika intergrigo;

Krom tiuj kampanjoj eblus plani :

- starigon de reto de esploristoj, kiuj laboras, en densa ligo kun la asocioj de aktivuloj agantaj sur loka nivelo, por konstrui ĝisdatigitajn kaj kompletajn datenbazojn pri la militbazoj de Usono kaj de la NATO. Preciza informo pri tiuj militaj kaj strategiaj temoj ebligis kreskigi la efikecon de la kampanjoj por ties malmuntado ;

- starigo de Observejo "Imperialism Watch" kiu denuncus ne nur la militojn kaj ties propagandon, sed ankaŭ ĉiujn manovrojn kaj premojn, ekonomiajn kaj aliajn, faratajn al la popoloj ;

- kreado de monda kontraŭimperiisma reto kiu kunordigu ĉiujn mobiliziĝojn tra la planedo ;

3.2 Por ekonomia reorganizado de la monda sistemo

En la perspektivo de agad-strategio por transformi la mondan ekonomian sistemon, necesas :

3.2.1 fortigi la protest-kampanjojn kontraŭ la nunaj funkci-reguloj de la Monda Organizaĵo pri Komerco (MOK) kaj por difinado de alternativaj reguloj (por eligi la MOK el la agrokulturo, la servoj, la intelekta proprieto...);

3.2.2 krei laborgrupojn, en rilato kun la asocioj kaj sociaj movadoj kiuj jam faris tian laboron de longa tempo, por bilanci, kiom eble plej serioze kaj komplete, la proponojn de alternativaj disponoj en la plej fundamentaj ekonomiaj kampoj :

- organizado de transigo de kapitaloj kaj de teknologioj ;

- propono de reguladoj ("invest-kodoj" ekzemple) kiuj precizigas la rajtojn de la nacioj kaj de la laboristoj ;

- organizado de la monsistemo : kontrolado de la kapitalfluo (aparte la spekulajn), forigo de la impostparadizoj, starigo de regionaj sistemoj por mastrumi la ŝanĝojn kaj ties esprimiĝo en renovigita monda sistemo (kritiko de la IMF kaj de la Monda Banko, reveno al la principo de antaŭrangeco de la juro de la nacioj por difini ties ekonomian sistemon, forigo de la malhelpoj truditaj de la decidoj ne intertraktitaj de la internaciaj organizoj...);

- ellaborado de vera leĝaro pri la eksteraj ŝuldoj (postuli de la regnoj kontrolprocedurojn kiuj ebligis identigi la fiajn ŝuldojn) kaj forigo de mobilizado, tre mallongtempe, por nuligo de la triamonda ŝuldo ;

- la reformoj de la socialaj servoj kaj de ties financado : edukado, sano, esplorado, pensioj...

3.2.3 krei grupojn de esploristoj specialigitaj por sekvi la movadojn de kapitaloj kaj de la meĥanismoj kiuj dependigas la nacian financkapitalon de la internacia financkapitalo ;

3.2.4 starigi laborgrupojn, kun interretejo kaj diskutgrupoj, laŭ landoj kaj regionoj, por studi la strukturojn de kapital-proprieto kaj de la meĥanismoj de funkciado de la kapitalismo en ĉiu lando kaj en ĝiaj rilatoj kun la internacia fincansistemo ;

3.2.5 krei formejojn de ĵurnalistoj por informi ilin pri la kompleksaj meĥanismoj de la novliberala tutmondigo ;

3.2.6 interkontaktigi, en formo de konektitaj interret-teksejoj, la diversajn asociojn de progresema kaj aktivaj ekonomikistoj engaĝitaj en la esplorado de alternativoj al la novliberala tutmondigo en ĉiu regiono de la mondo (Azio, Afriko, Latinameriko, Oceanio ; Eŭropo, Nordameriko).

3.3 POR REGIONIGOJ EN LA SERVO DE LA POPOLOJ KAJ KIUJ FOR-

TIGOS LA SUDON EN LA ĜENERAL-AJ INTERTRAKTADOJ

Deirante de la konstato ke la liberkomerco, ĉar ĝi favoras la plej fortajn, estas la malamiko de regiona integriĝo kaj ke tiu ne realigeblas laŭ ĝiaj reguloj, necesas aperigi la kondiĉojn de alternativa kunlaborado ene de ĉiu granda regiono, kiel ankaŭ la kondiĉojn de renovigo de la Trikontinento, en densa ligiteco kun la agado de la sociaj movadoj.

- En Latinameriko, fronte al la agresoj de la multnaciaj konzernoj, la laboristoj metis la demandon de regiona integriĝo en novan perspektivon, bazitan sur kooperativaj avantaĝoj, kaj plu sur kompara avantaĝo. Jen la kazo de la alternativaj eksperimentoj de kooperado en la Sudo pri petrolo (Petrocaribe), de reduktado de la ŝuldo (aĉeto de ŝuldoj inter la Sudaj landoj) aŭ de edukado kaj de sano (kubaj kuracistoj), ekzemple. Estas politikaj principoj, kiuj devas fondi tian kooperadon destinitan por favori la kreskadon kaj la solidarecon en ĉiuj landoj, kaj ne plu la reguloj trudataj de la MOK.

- En Afriko, la aspiro al unueco estas tre vigla, same kiel la konscio pri la neeblo de izolitaj rezistado aŭ disvolvado fronte al la premo de la novliberala tutmondigo. La multaj integrad-institucioj tamen estas senefikaj, kaj la plej aktivaj estas tiuj hereditaj el la periodoj de koloniado kaj rasdisigo. La Afrika Unio kaj ĝia ekonomia kaj socia programo (NEPAD) integras nenium ideon de kolektiva rezistado. En tiu kunteksto, la civilaj socioj devas konsciigi pri la neceso superi siajn dividojn.

Por la nordafrikaj landoj ĉe Mediteraneo, la interkonsentoj de Eŭropo-Mediterraneo estas kroma ekzemplo de regionigo je kosto de la Sudo.

- En Azio, por kontraŭstari la novliberalan tutmondigon, kaj malgraŭ la malfaciloj, popul-iniciatoj por alia regiona integriĝo, kiu kunigas multajn organizojn de la civilaj socioj, de NRO-j, ktp, ekfunkciigis en la plej multaj landoj, kaj ellaboris ekzemple popolan ĉarton kiu celas fortigi la kooperadon en la interŝanĝoj.

Sekve, ŝajnas oportune rekomendi, trans la intensigo de la kampanjoj kontraŭ la militoj kaj la militminacoj, la sekvajn proponojn :

3.3.1 por Latinameriko : larĝigi la subtenkampanjojn por la ALBA, por definitive fiaskigi la usonan strategion de la ALKA, instigi al sendependeco kaj disvolvado en justico kaj al egaleco inter la popoloj kaj konstrui integriĝon bazitan sur kooperado kaj solidareco kiu scias adaptiĝi al iliaj specifajoj ; mobilizi la sociajn movadojn por larĝigo kaj profundigo de la procesoj de alternativa integriĝo, laŭ la tipo de Petrocaribe aŭ Telesur ; instigi al interŝanĝoj kiuj respondas al koopera logiko ; kaj fortigi la interkonektiĝon de la agadoj de la sociaj kaj politikaj organizoj por realigi tiujn rekomendojn.

3.3.2 por Afriko : interesi la movadojn de la civilaj socioj pri la neceso formuli alternativajn proponojn en la afrikaj iniciatoj ; konsideri la neceson interligi la agadojn sur regiona kaj nacia nivelo ; lanĉi kampanjojn por paco por ĉesigi ekzistantajn konfliktojn aŭ preventi la riskojn de novaj konfliktoj ; rezigni konceptojn de integrado bazitaj sur raso aŭ kulturo.

3.3.3 por Azio : kontraŭigi la ekspansion kaj konkurencon de kapitalo inter landoj kaj fortigi la solidarecon inter laboraj klasoj de la diversaj landoj ; helpi la lokan cirkvitan inter produktado kaj konsumado ; helpi la sciencojn por kampara rekonstruado.

Por esti efika, la kunlaborado inter Sudaj landoj devas esprimi la solidarecon de la popoloj kaj de la registaroj kiuj rezistas al novliberalismo kaj serĉas alternativojn en la perspektivo de multpolusa monda sistemo.

4. POR DEMOKRATIA MASTRUMADO DE LA NATURRESURSOJ DE LA PLANEDO

La koncepto de "naturresursoj" estas submetota al tiu de la vivantaĵo, kaj do de la rajto je vivo, por ĉesigi la detruadon kaj la forpredadon de la planedo. Temas do pri vivnecesa principo kaj ne pri simpla mastrumado de la naturresursoj. Tiuj povas esti uzataj ne trans ilia renoviĝ-kapablo kaj nur alĝustigante ilin laŭ ĉiu lando. Ili uz-kriterioj estas difinitaj por garantii la disvolvadon kaj konservi la biodiversecon kaj la ekologiajn sistemojn. Necesas do subteni la disvolvadon de substituajoj al nerenovigeblaj resursoj. La varigo de la vivo (angle : *commodification of life*) montriĝas per militoj pro petrolo, akvo ktp. La nutraĵkomerco privilegias la kulturon de rento antaŭ la kulturo de vivteno kaj samtempe trudas teĥnikajn metodojn kiuj produktas dependecojn kaj medidetrudon (eksploatkontraktoj por trudi certajn materialojn, sterkaĵojn kaj semojn kiel GMO-jn).

Konkrete, du ag-niveloj pri medio devas esti kombinitaj : mikro kaj makro. Makro-nivelo, koncerne la ŝtatojn, estus dezirinde ke interŝtata kadro de multflanka interkonsentiĝo havu rimedojn por agado kaj politika premado sur la ŝtatoj por starigi ĝeneralajn disponojn. La mikronivelo koncernas siavice la lokajn aŭ regionajn agadojn, kie la civila socio devas ludi gravan rolon, nome por disvastigi informojn kaj ŝanĝi la praktikojn por ŝpari la resursojn kaj protekti la medion. La loka nivelo devas esti fortigota, ĉar la decidoj estas tro ofte nur makronivelo pensataj.

Sekvaj agoj povus rezultiĝi el tio :

4.1 starigi internacian tribunalon taskitan juĝi la ekologiajn krimojn : la Norda landoj kaj iliaj lokaj relaksaj povus tiam esti kondamnitaj pagi kompensojn al la Sudaj landoj (ekologiaj ŝuldoj) ;

4.3 nuligi la "polu-rajtojn" (angle : *pollution rights*) kaj iliajn merkatojn kaj trudi al la riĉaj landoj malpliigi siajn kvotojn de produktado de dioksido kaj de karbono (5,6 tunoj jare kaj persone por Usono) por ebligi al la malriĉaj kampkulturistoj (0,7 tunoj jare kaj persone por la landoj ekster la G8) industriiĝi ;

4.4 malpermesi ke grandaj akvobaraĵoj, se ili estas vere necesaj, estu konstruataj sen kompenso por la delokitaj loĝantaroj (ekonomiaj rifuĝintoj) ;

4.5 protekti la biologiajn kaj genetikajn resursojn kontraŭ patentoj de la Nordo kiuj malriĉigas la Sudajn landojn kaj konsistigas koloniisme tipan ŝtelon ;

4.6 kontraŭbatali la privatigon de akvo, subtenatan de la Monda Banko, eĉ en formo de privata-publika partnereco (angle : *PPP, private-public partnership*) kaj garantii minimuman kvanton da akvo por ĉiu persono en la respekto de la renoviĝo-ritmo de la grundakvo ;

4.7 starigi Observejon pri Medio (angle : *Ecologic Watch*) kapablan denunci kaj reagi al klaraj agresoj kontraŭ la medio.

5. POR PLI BONA ESTONTO DE LA KAMPARANAJ AGROKULTUROJ

En la kampo de la kamparana agrokulturo, ekzistas unue celoj je meza kaj longa tempodistanco, ligitaj kun la nutraĵa suvereneco kaj kiuj situas samtempe sur nacia, internacia, multflanka (tiu de la MOK) kaj

duflanka (Akordoj pri Ekonomia Partnereco AEP, france *Accords de partenariat économique [APE]*, intertraktataj inter la landoj AKP [Afriko-Karibio-Pacifiko] kaj la Eŭropa Unio) nivelo. Poste, nacinivelo, tio koncernas la politikon de agrokulturaj prezoj kaj merkatoj same kiel la struktur-politikon, la aliron de la agrokulturistoj al la produktimedoj kaj unuavice al la tero. Je tre mallonga tempodistanco, en 2006, necesas fiaskigi la Dohan Ciklon (angle : *Doha Round*), kio faciligos la rifuzon starigi la Akordojn pri Ekonomia Partnereco. Tiucele, la proponoj havas du aksojn : la rimedojn por trudi la nutraĵan suverenecojn je meza tempodistanco, kaj kiel antaŭan kondiĉon la fiaskigon de la Doha Ciklo kaj de la Akordoj pri Ekonomia Partnereco

5.1 Proponoj por trudi la nutraĵan suverenecojn :

La nutraĵa suvereneco estas la rajto agnoskenda por ĉiu ŝtato (aŭ ŝtataro) difini sian internan agrokulturan politikon kaj la specon de integriĝo en la mondmerkaton, kun la rajto protekti sin efike kontraŭ importado kaj subvencioj siajn agrokulturistojn kun la kondiĉo ke ili malpermesas al si ĉian eksportadon de agrokulturaj produktoj je prezo malpli alta ol la meza totala produktokosto sen rekta aŭ malrekta subvencio (al produktado aŭ distribuado). Ĝi estas la levilo kiu ebligas al ĉiuj landoj reakiri ĉiukampe sian nacian suverenecojn. Ĝi estas ankaŭ ilo por antaŭenigi la demokration, ĉar ĝi bezonas fortan engaĝiĝon de la diversaj agantoj de la agronutraĵaj retoj por difini siajn celojn kaj rimedojn, unuavice de la familiaj kampkulturistoj. Ĝi necesigas do reguligajn agojn sur nacia, subregiona kaj internacia niveloj.

5.1.1 Nacinivelo :

La ŝtatoj devas garantii la aliron de la kampkulturistoj al la produkt-resursoj, kaj unuavice al la tero. Necesas ĉesigi promociojn la agrokulturon de la agrokomerco kun akaparado de teroj fare de la naciaj burĝaroj (inter ili oficistoj) kaj la transnaciaj firmaoj malfavore al la kampkulturistoj. Tio implikas faciligi la investojn de la familiaj bienoj kaj transformi la lokajn produktojn por fari ilin pli logaj por la konsumantoj. La aliro al tero por ĉiuj kampkulturistoj de la mondo devas esti agnoskata kiel fundamenta rajto. Ĝia realigo necesigas taŭgajn reformojn de la bien-sistemoj kaj kelkfoje agrarreformojn.

Por ke la celo de nutraĵa suvereneco estu dividita de la urbaj konsumantoj - nepra kondiĉo por ke la registaroj engaĝiĝu -, necesas fari tri specojn de agado :

- enkadriigi la agadon de la komercistoj kiu malfavorigas la agrokulturistojn kaj la konsumantojn ;

- fari kampanjojn por interesi la konsumantojn pri la damaĝego por la agrokulturo kaj por la tuta ekonomio kaŭzata de la dependeco de importataj produktoj, kiuj estas praktike la solaj vendataj, ekzemple en la superbazaroj de okcidenta Afriko.

- altigi iom post iom la agrokulturajn prezojn per altigo de import-doganaĵoj por ne trafi la konsumantojn kun tre limigita aĉetpovo. Tio devas esti akompanata de distribuado por ili de aĉetkuponoj je antaŭa prezo de la lokaj nutraĵproduktoj, laŭ la modelo aplikata en Usono, Barato kaj Brazilo, ĝis kiam la progreso de produktivo de la kampkulturistoj malaltigos iliajn popecajn produktokostojn, kio ebligas al ili malaltigi siajn vendoprezojn por la konsumantoj.

5.1.2 Sur subregiona nivelo :

Por ke la ŝtatoj povu reakiri sian plenan suverenecojn, kaj unue la nutraĵan suverene-

con, la regiona politika integriĝo montriĝas nepre por la malgrandaj Sudaj landoj. Por tio necesas reformi la nunajn regionajn instituciojn, nome, en Afriko, la OAEMU [1] kaj la EKROA [2], tro dependaj de tiuj diversaj potencegoj.

5.1.3 Sur internacia nivelo :

Premi por ke la Unuiĝintaj Nacioj agnosku la nutraĵan suverenecon kiel fundamentan rajton de la ŝtatoj nemalhavebla por realigi la rajton je nutrado difinitan de la Universala Deklaro de la Homrajtoj de 1948 kaj de la Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj de 1996. Sur tiu nivelo, kvar instrumentoj de regulado de la internaciaj agrokulturaj interesoj estas starigendaj por efektiviĝi la nutraĵan suverenecon :

- Efika protekto ĉe importado, t.e. bazita sur variigebaj deprenaj kiuj garantias fiksan enirprezon por garanti minimumajn internajn agrokulturajn prezojn kiuj sekurigas la investojn de la agrokulturistoj kaj la pruntojn de la bankoj, ĉar la doganaĵoj estas nesufiĉe protektaj fronte al forte fluktuantaj mondaj prezoj, kiuj fluktuas eĉ pli forte pro la fluktado de la ŝanĝokvotoj.

- Forigo de ĉiaj dumpingoj, malpermesante ĉian eksportadon sub la meza totala produktokosto de la lando sen rektaj aŭ malrektaj subvencioj.

- Meĥanismoj de internacia kunordigado de la mastrado de la propono, por eviti strukturajn superproduktadojn kaj por minimumigi konjunkturajn superproduktadojn kiuj kolapsigas la agrokulturajn prezojn.

- La neceso eligi la agrokulturon el la MOK konfidante la internacian reguladon de la agrokulturaj interesoj al institucio de la Unuiĝintaj Nacioj kiu povus esti la ONA [3] Aparte per reformado de ĝia organiziĝo laŭ la triparta modelo de la ILO (Internacia Labor-Organizaĵo), kio asociigus por la regulado la reprezentantojn de la agrokulturaj sindikatoj (FIPA kaj Via Campesina) apud la reprezentantojn de la agronutraj firmaoj (kiuj agas jam en la ombro influante la registarojn kiuj intertraktas ĉe la MOK) kaj tiuj de la ŝtatoj.

5.2 Proponoj je mallonga tempdistanco por fiaskigi la Dohan Ciklon kaj la Akordojn de Ekonomia Partnereco :

Grava instruo de la Ministrokonferenco de la MOK en Honkongo estas ke Brazilo kaj Barato, kaj kun ili la G-20, distanciĝis de la interesoj de la triamondaj loĝantaroj kaj montriĝis plej deciditaj helpantoj por la novliberala tutmondigo. Ĉar la Doha Ciklo estas "ĝenerala pakajo" (angle : *single undertaking*), ekzistas rimedo por fiaskigi ĝin. La internacia civila socio, kaj unuavice la kamparanaj organizoj de la Nordo kaj Sudo, povos en komunika kampanjo montri ke tiuj subvencioj (aparte tiuj de la "verda skatolo") estas multe pli konsiderinda dumping-ilo ol la eksplicitaj eksport-subvencioj, kaj ili estos tio eĉ pli ekde la jaro 2014 kiam la unuaj estos forigitaj.

6. POR KONSTRUO DE UNUECA FRONTO DE LABORISTOJ

Du el la ĉefaj armiloj inter la manoj de la laboristoj estas la voĉdonrajto kaj la rajto starigi sindikatojn. La demokratio kaj la sindikatoj estas, ĝis nun, konstruitaj ĉefe sur nacia bazo. Tamen, la novliberala tutmondigo estas defio por la laboristoj de la tuta mondo kaj la monda kapitalismo ne alfronteblas nur sur nacia nivelo. Hodiaŭ, la tasko estas duobla : fortigi la nacian nivelon kaj samtempe tutmondigi la demokration kaj reorganizi mondan laboristan klason.

La amasa senlaboreco kaj la kreskanta kontraŭregula formo de laboro estas plia

grava kialo por repensi la ekzistantajn organizojn de la laboristaj klasoj. Monda strategio de laboro devas konsideri ne nur la situacion de la laboristoj kun stabilaj kontraktoj. La dungado ekster laŭregulaj sektoroj koncernas kreskantan parton de laboristoj, eĉ en la industrilandoj. En la plej multaj Sudaj landoj, la laboristoj de la eksterregula sektoro - laboristoj kun tempe limitaj dungoj, laboristoj de la eksterregulaj sektoroj, memdungoj, senlaboruloj, stratvendistoj, tiuj kiuj vendas siajn proprajn servojn -, formas kune la plimulton de la laboristaj klasoj. Tiuj grupoj kreskas en la plej multaj Sudaj landoj pro alta senlaboreco kaj pro duobla proceso, unuflanke la rariĝo kaj eksterreguliĝo de garantiitaj dungoj kaj aliflanke la daŭra kamparana elmigrado. La plej grava tasko estos por la laboristoj ekster la regula sektoro organiziĝi kaj por la tradiciaj sindikatoj malfermiĝi por realigi komunan agadon.

La tradiciaj sindikatoj spertas malfacilojn por respondi al tiu defio. Ne ĉiuj organizaĵoj de laboristoj ekster regulaj sektoroj estos nepre sindikatoj aŭ similaj organizoj, kaj la tradiciaj sindikatoj devos ankaŭ transformiĝi. Novaj perspektivoj por konstrui kune, bazitaj sur horizontalaj ligoj kaj la reciproka respekto, devas disvolviĝi inter la tradiciaj sindikatoj kaj la novaj sociaj movadoj. Por tio, la sekvaj proponoj estu konsiderotaj :

6.1 Malfermiĝo de la sindikatoj al kunlaborado kun la aliaj sociaj movadoj sen provi subordigi ilin sub la tradicia sindikata strukturo aŭ sub specifa politika partio.

6.2 Starigo de sindikataj strukturoj efektive transnaciaj por alfronti la transnaciajn dungistojn. Tiuj sindikataj strukturoj devus havi samtempe kapablon intertrakti kaj mandaton organizi komunajn agadojn trans la naciaj limoj. Por tio, grava paŝo estus organizi fortajn sindikatajn strukturojn ene de certaj transnaciaj entreprenoj. Tiuj posedas kompleksan produktado-regon kaj estas ofte tre sentemaj al ĉia rompo en la ĉenoj de produktado kaj de distribuado, kio indikas vundeblecon. Kelkaj sukcesoj en la bataloj kontraŭ la transnaciaj firmaoj povus havi realan efikon sur la mondaj fortrilatoj inter kapitalo kaj laboro.

6.3 Tehnologa disvolvado kaj strukturŝanĝo estas necesas por plibonigi la vivkondiĉojn kaj por elradikigi la malriĉecon, sed la reloko de la produktado realiĝas hodiaŭ ne laŭ la intereso de la laboristoj, sed ekskluzive laŭ la logiko de la profito. Necesas subteni laŭgradan plibonigon de la salajroj kaj de la laborkondiĉoj, kreskantan lokan produktadon kun loka postulo kaj sistemon de intertraktado por la reloko de kiel alternativoj al la logiko de profito kaj liberkomerco. Tiuj relokoj povus esti parto de la transnaciaj intertraktadoj, por eviti ke la laboristoj de diversaj landoj estu devigataj reciproke konkurenci kun la aliaj en senkompata batalo.

6.4 Konsideri la rajtojn de la migrantaj laboristoj kiel bazan zorgon por la sindikatoj certigante ke la solidareco inter laboristoj ne estu ligita al ilia nacia deveno. Efektive, disigoj kaj diskriminacio, ĉu sur etnaj bazoj aŭ aliaj, estas minacoj por la solidareco de la laborista klaso.

6.5 Zorgi ke la estonta transnacia organiziĝo ne estu konceptita kiel unueca, hierarĥia kaj piramideca strukturo, sed ja kiel variaĵo de diversaj organiz-tipoj, kaj reta strukturo kun multaj horizontalaj ligoj.

6.6 Antaŭenigi reorganizitan laborfronton en strukturoj kiuj kovras ankaŭ la laboristojn ekster la formala sektoro en la tuta mondo, kapablan en kunordigita agado efike alfronti la tutmondigintan kapitalismo.

Nur tia tutmonda kaj renovigita movado de la laboristoj, agante kune kun aliaj sociaj movadoj, povos transformi la nunan mondon kaj krei mondan ordon bazitan sur solidareco anstataŭ sur konkurenco.

7. POR DEMOKRATIIGO DE LA SOCIOJ KIU DEVAS EBLIGI PLENAN HOMAN DISVOLVIĜON

La progresemaj fortoj devas alproprigi al si la koncepton de demokratio, ĉar alternativa, socialisma socio devas esti plene demokratio. La demokratio ne dekretoblas de alte. Ĝi estas proceso de kultura transformiĝo, ĉar la homoj transformiĝas pere de siaj propraj praktikoj. Nepras do ke la agantoj de la maldekstraj aŭ progresemaj registaroj komprenu ke necesas krei spacojn de reala partopreno sur la nivelo de la laborlokoj kiel sur tiu de la geografiaj viv-lokoj. Sen transformiĝo de la homoj al protagonistaj agantoj de sia historio, oni neniel povos solvi la problemojn de la popoloj : sanon, nutradon, edukadon, loĝadon... La falo de la socialismaj landoj de orienta Eŭropo multe rilatas kun tiu foresto de partopreno. La civitanoj de tiuj landoj estis apenaŭ plu motivitaj defendi reĝimojn kie ili estis observantoj kaj ne agantoj.

La luktado por demokratio devas ankaŭ esti ligita kun la luktado por elradikigo de la malriĉeco kaj de ĉiaj ekskludoj. Efektive, se oni volas solvi tiujn problemojn, necesas ke la popolo fariĝu la subjekto de la potenco. Tio implicas la luktadon kontraŭ la profit-logiko de la kapitalo kaj starigi, en la konkereblaj spacoj, malsaman logikon, humanisman kaj solidaran. Ĉar la nura aserto de la neceso de alternativa socio jam ne sufiĉas kaj do necesas proponi popolajn iniciatojn kiuj estu alternativoj al kapitalismo kaj kiuj provu rompi la varlogikon kaj la rilatojn kiujn tiu dinamiko trudas.

Sed necesas ankaŭ organizi batalojn kiuj ne reduktiĝu al simplaj ekonomiaj postuloj, eĉ se tiuj necesas, kaj kiuj proponu alternativan socian projekton, kiu inkludas realajn nivelojn de potenco kaj de demokratio, preterpasantaj la nunajn formojn de reprezentata, parlamenta kaj elektisma demokratio. Necesas do lukti por nova tipo de demokratio, desuba, por tiuj sube, pere de lokaj registaroj, kamparaj komunumoj, laboristaj frontoj, civitanoj... Tiu demokratia praktiko, solidara, estos la plej bona maniero altir novajn sociajn sektorojn en luktadon por alternativa socio plene demokratia.

Por konkretigi la eldiritajn principojn, proponiĝas sekvaj grandaj linioj :

Enskribi la demokration en tutaĵon de kondiĉoj kiuj karakterizas la movadojn de emancipiĝo kaj de liberiĝo, en ilia individua kaj kolektiva dimensio.

Agnoski ke la fiasko de sovetismo kaj de la reĝimoj devenaj de malkoloniigo rezultas grandparte el ilia rifuzo de liberecoj kaj el ilia subtaksado de la demokratio. La elaborado de alternativoj devas integri tiun konstaton kaj doni unuarangan lokon al la demokratia konstruado.

Kontesti la duoblan diskurson de la dominantaj potencoj pretaj doni lecionojn pri demokratio. La cinikeco de la usona imperiismo estas aparte neeltenebla dum ĝi montriĝas kiel krimulo de militoj, de torturoj, de liberec-perfortoj. Tamen, tio ne povas servi kiel preteksto por limigi la liberecojn kaj la uzon de la demokratio.

Rifuzi la dominantan koncepton de demokratio disvastigata de Usono kaj la okcidentaj potencoj. La demokratio ne difineblas kiel akceptado de la merkataruloj kaj de subordiĝo al la mondmerkato, de plurismaj elektoj kontrolataj deekstere kaj de ideologio kiu reduktas la homrajtojn. Tiu speco de demokratio konsistas en trudado de la

ekspansio de la varigo ligante tiun arbitron kun la agnoskita graveco de liberaj elektoj kaj respekto de la rajtoj. Per tio oni nur limigas la demokration, oni perversigas ĝian sencan.

Agnoski ke ekzistas forta dialektiko inter politika demokratio kaj socia demokratio, ĉar politika demokratio estas nekompleta kaj ne povas daŭri se persistas malegalecoj kaj ekspluatado kaj socia maljusteco. Socia demokratio ne povas progresi sen luktado kontraŭ subpremo kaj diskriminacioj, kaj necesas memori ke nenia socia politiko povas pravigi foreston de liberecoj kaj malrespekton de la fundamentaj rajtoj.

Aserti ke la demokratio bezonas efektivan kaj kreskantan partoprenadon de la popolo, de la produktantoj kaj de la loĝantoj. Tio implicas travideblon en la decidprocezoj kaj en la respondecoj kaj ĝi ne nuligas la gravecon de la reprezenta demokratio. Male, ĝi kompletigas kaj profundigas ĝin.

Ĉar la demokratio devas faciligi la luktadon kontraŭ malriĉeco, malegalecoj, maljustaĵoj kaj diskriminacioj, ĝi devas lasi strategian lokon al la malriĉuloj kaj subprematoj, al ties luktoj kaj al ties movadoj. Tiu-sence la demokratio en la funkciado de tiuj movadoj helpas al ilia daŭremo kaj iliaj sukcesoj.

La demokratio en la alimondisma movado estas indiko por la graveco kiun la movado donas al la demokratio en ĝiaj orientiĝoj. Ĝi implicas renovigon de la politika kulturo kaj de la organiz-kulturo, aparta zorgo por la demandoj de aŭtoritato kaj de hierarĥio. Tiu-uce, unu el la tujaj agadproponoj estas kampanji por ke la movadoj de popola edukado donu gravan lokon al la civitana edukado kaj al la edukado al demokratio kaj ke tiu dimensio ĉeestu en la instruado. Ni memoru ke efektive la alimondisma movado estas portanto de fundamente demokratia projekto. Ĝi postulas aliron por ĉiuj al la fundamentaj rajtoj. Temas pri civilaj kaj politikaj rajtoj kaj nome pri la rajtoj je libera organiziĝo kaj je libera esprimiĝo kiuj estas la fundamentoj de la demokratiaj liberecoj. Ĝi postulas ankaŭ la ekonomiajn, sociajn, kulturajn kaj mediajn rajtojn kiuj estas la fundamentoj de la socia demokratio. Ĝi postulas fine la kolektivajn rajtojn kaj la rajtojn de la popoloj lukti kontraŭ subpremo kaj kontraŭ la perfortoj kiuj estas al ili trudataj. Temas tie pri programo de realigo de la demokratio.

La alimondisma movado rekonas ankaŭ la gravecon de la publikaj servoj kiel unu el la esencaj rimedoj por garanti aliron al la rajtoj por ĉiuj kaj la egalecon de la rajtoj. Ĝi defendas la luktojn de la laboristoj kaj de la uzantoj de la publikaj servoj. Ĝi antaŭenigas la proponojn devenajn de la movadoj por defendi la publikajn servojn, kaj nome de la edukad- kaj san-servoj. Ekzemple por la sano la aliron al listo de senpagaj medikamentoj kaj la rifuzon de monopoloj, de la diktatoreco de patentoj kaj de la pretendo patentigi la vivantaĵon.

La luktado por demokratio devas konsideri la diversajn nivelojn de interveno laŭ la spacoj. Ni menciuj kvin : entreprenoj, loka demokratio, nacia demokratio, la grandaj regionoj, monda demokratio. Por ĉiu de tiuj niveloj, kiel ilustraĵo, eblas proponi agadon. La elekto de la prioritatoj rezultigos el la strategia debato.

7.1 Demokratio en entreprenoj estas graveca postulo. Ĝi implicas agnoskon de la potenco de la laboristoj, de la uzantoj kaj de la teritoriaj kaj naciaj publikaj kolektivaĵoj. Ĝi bezonas la rifuzon de la diktaturo de la akciuloj kaj de la detrua logiko de la financa kapitalo. Ĝi kondukas al kontrolado de la decidoj kaj nome de la delokadoj. La va-

lorigo de la ennovigaj formoj de memorganizado kaj mutualigo estas unu el la manieroj postuli la plurecon de la produktadoformoj kaj rifuzi la falsan evidenton de la efikeco de la privata kapitalisma entreprenado. La movado por socia kaj media respondeco de la entreprenoj havas grandan intereson, malgraŭ la riskoj de alproprigo, kondiĉe ke ĝi konduku al trudaj publikaj normoj en la internacia juro.

7.2 La loka demokratio respondas al la postulo de proksimeco kaj partoprenigo. Ĝi kuŝas sur lokaj institucioj kiuj devas garanti la publikajn servojn kaj kiuj antaŭimagas alternativon al novliberalismo preferante la lokan nivelon kaj la kontentigon de la bezonoj de alĝustigo de la tuta socio al la mondmerkato. Ĝi ebligas renovigi la civitanecan, nome per tiu de rezido kaj de ĝiaj konsekvencoj rilate voĉdonrajton.

7.3 La nacia demokratio restas la strategia nivelo. La demandoj de identecoj, de landlimoj, de la respekto al rajtoj de la malplimulto, de la legitimeco de la institucioj partoprenas en la fundamentoj de la popola suvereneco. La publikaj politikoj povas esti spacoj de alfrontiĝo kontraŭ la novliberalismo. La redistribuado de la riĉaĵoj bazita sur impostoj estas defendenda kaj etendenda. Disponoj kiel la minimuma enspezo kaj la sociala kovraĵo bazita sur la solidareco inter generacioj ne estas rezervitaj por la riĉaj landoj, sed devenas de la kondiĉoj de divido inter labor-kompensoj kaj profitoj, specifaj por ĉiu socio.

7.4 La grandaj regionoj povas esti vehikloj de la novliberala tutmondigo, kiel en la Eŭropa Unio, sed ankaŭ de la kontraŭtendencoj kaj rezistejoj, kiel montras la evoluoj de Merkosur kaj la fiaskigo de la ALKA. El tiu vidpunkto, la kontinentaj sociaj forumoj ludas konsiderindan rolon.

7.5 La monda demokratio estas perspektivo de respondo al la novliberala tutmondigo. En la nuna situacio, la prioritataj mobilizoj de la alimondisma movado estas: nuligo de la ŝuldo, fundamenta kritiko al la MOK, forigo de la impostparadizoj, internacia impostigo kaj tute aparte tiu de la financa kapitalo (kapital-transigoj, profitoj de la transnaciaj firmaoj, ekologiaj impostoj...), radikala reformo de la internaciaj financ-institucioj (kun nome la principo unu lando, unu voĉo), la reformo de la Unuiĝintaj Nacioj kun respekto de la rajtoj de la popoloj kaj la rifuzo de prevent-milito.

Necesus do: havigi al si Observejon de Demokratio, kiu kapablu rezisti al la hegemonio de la dominantaj landoj, inter kiuj unuavice Usono, kaj al ilia trompa diskurso pri demokratio; instigi al civitana kontrolo; antaŭenigi la demokratiajn formojn inventitajn kaj realigitajn fare de la sociaj kaj civitanaj movadoj.

8.. POR ELRADIKIGO DE ĈIAJ SUBPREMOJ, EKSPLOATADOJ KAJ FREMDIGO DE VIRINOJ

Ekzistas multaj formoj de patriarkeco, kiel ankaŭ ĝiaj ligoj kun la imperiismo kaj novliberalismo. Gravas kaj necesas analizi ĝian efikon sur la virinoj. La koncepto de patriarkeco referencas la dominadon de la patro/patriarĥo kaj servis por priskribi familian modelon dominatan de la viroj kun aŭtoritato super ĉiuj aliaj familianoj. La modelo certe ne estas universala, ĉar multaj afrikaj socioj estis matriarcecaj aŭ laŭ du-speca reĝimo en kiu patra kaj patrino hereditarioj havas sian rolon por la individuo.

Tiu patriarkeca sistemo etendiĝis kun la kresko de la abrahamecaj religioj kaj de la koloniaj ideologioj kaj leĝaroj. Hodiaŭ la patriarkeco signas recipe la viran dominadon, la malegalecon inter la seksoj malfavore al la virinoj kaj ties multajn formojn de

subordiĝo. La familio kiu sociigas la infanon restas la unua loko de la „malsovaĝigo“ de la knabinoj kaj virinoj. Tiu hierarĥio de la seksoj estas des pli akra ĉar ĝi estas subtenata de kulturaj normoj kaj de religiaj valoroj kiuj kondukas al alproprigo de la produktaj kaj reproduktaj kapabloj de la virinoj. La ŝtato fortigas tiun patriarkecan povon per siaj politikoj kaj siaj familiaj kodoj. Diskriminacioj persistas en la rilatoj sine de la familia sfero, en edukado, en aliro al la naturresursoj, materiaj kaj financaj, al dungo, en la partopreno en la politika potenco, ktp. Malgraŭ sentebala avanco de la virinaj rajtoj, la vira dominado firmiĝas ankoraŭ daŭreme per la „virigo“ de la institucioj kiuj reproduktas la novliberalajn organizojn.

La analizo de la rilatoj inter patriarkeco kaj imperiismo kaj la bilanco, miksitaj, de la virin-bataloj kontraŭ tiuj sistemoj kondukas al propono de pluraj agadoj:

8.1 Rompi kun la marĝenigo de la virintemo, kiu kondukas al politika kaj scienca „apartigo“ [disigo kvazaŭ rasdisigo]. Ĉar la seksa demando estas transverse ĝenerala, ĝi devas esti konsiderata en ĉiuj rekomendoj. 8.2 Daŭrigi la gruppremadon de la organizoj de la civila socio kaj de la politika klaso, por fortigi la aliancon inter feminismaj organizoj kaj progresemaj fortoj kaj enskribi en ties agendon la pledon favore al la virinoj, kiu enhavu:

la luktadon kontraŭ la bildo de ilia mal-supera pozicio en la sociaj, politikaj, kulturaj kaj religiaj diskursoj en la ĝenerala socio;

la disvolvadon de edukado kaj de formado de virinoj por rompi la interniĝon de tiu pozicio de malsupereco;

disvastigo de pli bona konscio pri ilia aktiva rolo en la socio;

instigo al la viroj pridemandi sin pri tiu vira dominado por malkonstrui ties meĥanismojn;

fortigo de la juraj dispozicioj por efektiva egaleco inter la seksoj;

kreskigo de ilia reprezentiĝo en la institucioj (egaleco).

8.3 Videbligi la historion de la virinoj, iliajn individuajn kaj kolektivajn agadojn, nome:

la projekton atribui la pripacan Nobel-premion al mil virinoj, institucio starigita de asocioj de Honkongo;

la kampanjon Virinoj diras Ne al milito (angle: „No to war“) kontraŭ la Irak-milito;

diversajn kampanjojn pri aktualaj temoj aŭ pri soci-projektoj.

8.4 Antaŭenigi la fundamentan rajton de la virinoj disponi je sia fizika kaj mensa korpo, regi mem siajn decidojn pri sia viv-elekto: edukado, dungo, diversaj aktivecoj, sed ankaŭ sekseco kaj fekundeco (rajto je kontraŭkoncipado, elekto de fekundeco, rajto je aborto...) - ĉar la virina korpo estas la loko de ĉiaj subpremoj kaj perfortoj.

8.5 Subteni la teorion pripensadon, elirante de la virinaj spertoj, por kontraŭi la viran dominadon, kaj fortigi la perspektivon de la virinoj pri diversaj demandoj kiuj tuŝas la socion por malfermi novajn horizontojn por la esplorado kaj la agado, nome pri loĝantaro, en daŭrigo de la Konferenco de Kairo pri la loĝantaro (1994), aŭ pri medio, sekve al la Pintkunveno pri la Tero en Rio de Ĵaneiro (1992), dum kiu la virinoj postulis la rajton vivi en sana medio.

8.6 Disvolvi la datenbazojn kaj interretteksejon pri la rilatoj inter virinoj kaj imperiismo kaj novliberalismo.

9. POR DEMOKRATIA MASTRUMADO DE LA KOMUNIKILOJ KAJ KULTURA DIVERSECO

9.1 Por rajto je edukado:

Supre ĉe la rajto pri kulturo, la rajto pri informado kaj la rajto informi, staras la fundamenta problemo de la rajto je edukado. Tiu rajto, kvankam ĝi estas ĉie agnoskita, restas senfika en multaj landoj, kaj tute aparte por la knabinoj. Jen do prioritata tasko por ĉiuj sociaj movadoj premi sur la registaroj por ke ili plenumu siajn plej elementajn devojn den tiu kampo.

9.2 Por la rajto je informado kaj la rajto informi:

9.2.1 Iniciatoj direkte al la grandaj komunikiloj

La rajto je informado kaj la rajto informi kontraŭdiras la ĝeneralan logikon de la komunikila sistemo. Per sia kreskanta koncentriĝo mondscale, ĝi estas efektive ne nur rekta partoprenanto, kaj profitanto de la meĥanismoj de la novliberala tutmondigo, sed ankaŭ vehiklo de ties ideologio. Necesas do lukti paŝon post paŝo por meti sablograjnojn en tiu entreprenado de „formatado“ de la mensoj, kiu pretendas akceptigi la novliberalan ordon kiel neeviteblan kaj eĉ dezirindan. Por tio, kampanjoj devas lanĉiĝi en ĉiu lando, en la kadro de internacia kunordigado:

por leĝ-iniciatoj celantaj lukti kontraŭ la koncentriĝo de la komunikiloj;

por leĝ-iniciatoj celantaj garanti la aŭtonomecon de la redakcejoj rilate al akciuoj kaj proprietuloj, instigante tie, kie ili ne ekzistas, al starigo de ĵurnalistaj societoj, al kiuj oni donu realajn povojn;

por edukado al komunikil-kritiko en la lerneja sistemo kaj en la popolaj organizoj.

9.2.1.1 Favorigi la alternativajn komunikilojn

La alternativaj kaj neprofitcelaj komunikiloj, ĉiufarmaj (papero, radio, televido, interreto), ludas jam gravan rolon por plurisma informado kaj ne submetita al la diktato de la financo kaj de la transnaciaj entreprenoj. Jen pro kio necesas postuli de la registaro ke tiuj komunikiloj ĝuu privilegiajn reguladajn kaj impostajn kondiĉojn. Observejo de Alternativaj Komunikiloj povus identigi la plej avancen leĝaron aktuale ekzistantan en la mondo. Laŭ la modelo kiun uzas la proprietuloj kaj direktoroj de la grandaj komunikiloj, utilus organizi ĉiujare renkontiĝon de respondeculoj de la alternativaj komunikiloj de la tuta mondo, eventuale en la kadro de la proceso de la mondaj sociaj forumoj.

9.2.1.2 Ne lasi la monopolon de la mondaj bildoj al la Nordaj televido

La grandaj internaciaj televidĉenoj de la Nordo, kiel CNN, longan tempon ĝuis faktan monopolon kaj donis vidon de la mondo kiu respondis al la interesoj de la dominantaj potencoj. En la araba mondo, la starigo de Al-Ĵazira ebligis, kun granda profesia kompetento, rompi kun la unuflanka vido de la konfliktoj de Proksim-Oriento. La ĵusa lanĉiĝo de Telesur ebligas al Latinamerikaj komunikiloj. La starigo de afrika ĉeno respondas al sama bezono, kaj necesa fari ĉiajn klopodojn por ke ĝi naskiĝu.

9.3 Por la rajto esprimi sin en sia lingvo:

Por ĉiuj neusonaj elitoj de la planedo, la uzado de la angla estas la unua rekonilo. Ekzistas logika ligo inter la libervola aŭ malribela submetiĝo al la usona superpotenco kaj adopto de ties lingvo kiel sola ilo de internacia komunikado. Nu, la ĉina, la latinaj lingvoj - se oni instigas al interkompreniĝo sine de la granda familio kiun ili

konsistigas - kaj morgaŭ la araba estas tute same alvokitaj ludi paralele tiun rolon. Temas pri politika volo. Por lukti kontraŭ la „angla inundo“, necesas subteni sekvajn disponojn:

- Meti kiel celon, en la edukistemoj, kaj kiam la kondiĉoj ebligas tion, instrui du fremdajn lingvojn (kaj ne nur la anglan) por aktivaj kaj pasivaj kompetentoj (kompreni, paroli, legi, skribi) kaj unu aŭ du pliajn lingvojn por pasivaj kompetentoj (legi kaj parole kompreni).

- Meti en praktikon, en la edukistemoj, la metodojn de interkompreniĝo de la latinaj lingvoj (hispana, kataluna, franca, itala, portugala, rumana kiuj estas oficialaj lingvoj en 60 landoj). La komuniĝo estas plej efika kiam ĉiu parolas sian lingvon kaj komprenas tiun de sia interparolanto.

En la specifa kazo de Afriko, fari el instruado kaj promocio de la naciaj lingvoj politikan prioritaton de la Afrika Unio.

Starigi internacian fonduson de subteno al tradukado de kiom eble plej multaj dokumentoj en la lingvoj de la lando kun malgrandaj resursoj, aparte por ke ili ekzistu sur interreto.

10. POR DEMOKRATIIGO DE LA INTERNACIAJ ORGANIZOJ KAJ INSTITUCIO DE MULTPOLUSA INTERNACIA ORDO

La Unuiĝintaj Nacioj estas institucio de la popoloj, kio per tio estas atingo. Sed temas ankaŭ pri loko de fortrilatoj inter ŝtatoj, kies efiko povas montriĝi ambivaleca, eĉ negativa, en la kazo de certaj popoloj aŭ en certaj cirkonstancoj. Necesas do transformoj, en la mezuro en kiu la hegemonio de la plej potencaj landoj efikas kiel instrumentigo de la UN por ilia profito. Sekve ni proponas jenajn iniciatojn:

10.1 Demokratiigi la spacon de la Unuiĝintaj Nacioj;

10.2 Instigi al „reformoj“ de la institucio de la UN kun la celo limigi la malegalecojn de fortrilatoj inter ŝtatoj;

10.3 Agi direkte al la registaroj kiuj konsistigas la UN, kaj por tio starigi en ĉiu lando Observejon kiu ebligu travideblon de la agado de la registaroj ene de la Unuiĝintaj Nacioj, de ties specialigitaj organismoj kaj de la instancoj starigitaj en Bretton Woods (IMF, Monda Banko, MOK);

10.4 Refinanci la specialigitajn organizaĵojn (ekz-e ONA [Organizaĵo pri Nutrado kaj Agro-kulturo] aŭ MOS [Monda Organizaĵo pri Sano]), por eviti ties dependecon de transnaciaj entreprenoj;

10.5 Certigi etenditan kaj efektivan ĉeeston de la sociaj movadoj kaj de la neregistraj organizoj en la internaciaj institucioj;

10.6 Antaŭenigi internaciajn justec-kortumojn, nome koncerne ekonomiajn krimojn, evitante ke ili estu instrumentigitaj de la dominantaj potencoj, kaj, samtempe, starigi opini-tribunalojn por antaŭenigi alternativajn manierojn realigi la justecon;

10.7 Por demokratiigi la Unuiĝintajn Naciojn, kreskigi la potencon de la Ĝenerala Asembleo kaj demokratiigi la Sekurec-Konsilion por rompi la monopolojn (veto-rajton, atompotencojn);

10.8 Antaŭenigi organizon de la Unuiĝintaj Nacioj kiu ebligu regionigon dotitan per realaj povoj en la diversaj kontinentoj. Estas aparte proponita starigi Socian Forumon de Mez-Oriento, kiu kunigu la progresemajn fortojn de la landoj de tiu regiono por serĉi alternativajn solvojn kontraŭ la usona projekto de „Granda Mez-Oriento“.

10.9 Antaŭenigi, interne de la UN, la respekton al la suvereneco de la nacioj, tute

aparte fronte al la agadoj de la IMF, la Monda Banko kaj la MOK.

10.10 Antaŭenigi Mondan Asembleon de la Popoloj por eliri el la diabla cirklo de malriĉeco.

Tradukita de Vilhelmo Lutermano

Notoj : (sekvapaĝe)

1. OAEMU : Okcident-Afrika Ekonomia kaj Mona Unio (france : *UEMOA, Union économique et monétaire ouest-africaine*), ekde 1962-05-12 ; membroj : Benino, Burkino, Eburbordo, Maŭritanio, Niĝerlando, Senegal, Togolando (ekde 1963-11-27). Monunuo : Franko de la Afrika Financ-Komunumo (F CFA), emisio konfidata al la Centra Banko de la Ŝtatoj de Okcidenta Afriko. - vl

2. EKROA (france CEDEAO, por : *Communauté économique des États de l'Afrique de l'Ouest*) : Ekonomia Komunumo de la Regnoj de Okcidenta Afriko. Ĝi estas starigita en 1975-05-18 kaj ekvalidis en marto 1977. Sidejo : Lagoso (Niĝerio). Membroj : Benino, Burkino, Kabo-Verda, Eburbordo, Gambio, Ganao, Gvineo, Gvineo-Bisaŭ, Liberio, Malio, Maŭritanio, Niĝerlando, Niĝerio, Senegal, Sieraleono, Togolando. - vl.

3. ONA : Organizaĵo pri Nutraĵo kaj Agrokulturo (angle : *FAO, Food and Agriculture Organization*), sidejo : Romo, starigo : 1945-10-16, membroj : 171 (en 1996) ; celo : Pliibonigi la disvolvado de agrokulturo, de fiŝkaptado, de arbaroj (altigo kaj pli bona distribuado de nutraĵoj kaj agrokulturaj produktoj) ; teĥnika helpo al evolulandoj ; plibonigo de la enspezoj, de la vivnivelo kaj de la nutrado de la kampara loĝantaro. - vl.

(Daŭrigo de paĝo 1, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj)

por la respektivaj kampoj, kaj ke estas plane daŭrigi tiun kunlaboradon por antaŭenigi kaj certigi ilian aplikadon;

Post esti decidinta adopti diversajn proponojn koncerne partan revizion de la konvencio (n-ro 107) pri la indiĝenaj kaj tribaj loĝantaroj, 1957, demando kiu konsistigas la kvaran punkton de la tagordo de la sesio;

Post esti decidinta ke tiuj proponoj alprenos la formon de internacia konvencio revizianta la konvencion pri indiĝenaj kaj tribaj loĝantaroj, 1957,

adoptas, ĉi tiun dudek-sepan de junio mil naŭcent okdek naŭ, la ĉi-sekvan konvencion, kiu estas nomata Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj, 1989.

PARTO I. ĜENERALA POLITIKO

Artikolo 1

1. Tiu ĉi konvencio aplikiĝas

a) al la tribaj popoloj en sendependaj landoj kiuj distingiĝas de la ceteraj sektoroj de la nacia komunumo per siaj sociaj, kulturaj kaj ekonomiaj kondiĉoj kaj kiuj estas komplete aŭ parte regataj de kutimoj aŭ tradicioj kiuj estas propraj al ili aŭ de speciala leĝaro;

b) al la popoloj en sendependaj landoj kiuj estas konsiderataj indiĝenaj ĉar ili devenas de loĝantaroj kiuj priloĝis la landon, aŭ geografian regionon al kiu apartenas la lando, en la epoko de la konkero aŭ koloniigo aŭ de la starigo de la nunaj ŝtatlimoj, kaj kiu, kia ajn estas ilia jura statuso, konservas siajn proprajn sociajn, ekonomiajn,

kulturajn kaj politikajn instituciojn aŭ iujn el ili.

2. La sento de indiĝena aŭ triba aparteno konsiderendas kiel baza kriterio por determini la grupojn al kiuj aplikiĝas la dispozicioj de tiu ĉi konvencio.

3. La uzo de la termino popoloj en tiu ĉi konvencio neniel interpreteblas kiel havanta ian ajn implikiĝon pri la rajtoj kiuj povas ligiĝi kun tiu termino kaŭze de la internacia juro.

Artikolo 2

1. Estas la tasko de la registaroj, kun partopreno de la koncernataj popoloj, disvolvi kunordigitan kaj sisteman agadon por protekti la rajtojn de tiuj popoloj kaj garanti la respektadon de ilia integreco.

2. Tiu agado devas enteni dispoziciojn kiuj celas:

a) certigi ke la membroj de tiuj popoloj ĝuu, egalece, rajtojn kaj eblecojn kiujn la nacia leĝaro donas al la aliaj membroj de la loĝantaro;

b) antaŭenigi la plenan realigon de la sociaj, ekonomiaj kaj kulturaj rajtoj de tiuj popoloj, en la respekto de ilia socia kaj kultura identeco, de iliaj kutimoj kaj tradicioj kaj de iliaj institucioj;

c) helpi la anojn de tiuj popoloj elimini la elementojn de soci-ekonomia evoludiferenco kiuj povas ekzisti inter indiĝenaj membroj kaj aliaj membroj de la nacia komunumo, en maniero kongrua kun iliaj aspiroj kaj ilia vivmaniero.

Artikolo 3

1. La indiĝenaj kaj tribaj popoloj devas plene ĝui la homrajtojn kaj fundamentajn liberecojn, sen ajna malhelpo nek diskriminacio. La dispozicioj de tiu ĉi konvencio aplikendas sendistinge al la geanoj de tiuj popoloj.

2. Nenia perforto aŭ truddispono uzeblas kontraŭa al la homrajtoj kaj al la fundamentaj liberecoj de la koncernataj popoloj, inkluzive de la rajtoj eldiritaj en tiu ĉi konvencio.

Artikolo 4

1. Specialaj dispozicioj farendas, laŭ la bezono, por konservi la homojn, la instituciojn, la havaĵojn, la laboron, la kulturon kaj la medion de la koncernataj popoloj.

2. Tiu specialaj dispozicioj devas ne esti kontraŭaj al la libere esprimataj deziroj de la koncernataj popoloj.

3. Tiuj dispozicioj devas neniel atenci la ĝuadon, sendistinge, de la tutaĵo de la rajtoj ligitaj kun la civitaneco.

Artikolo 5

Aplikante la dispoziciojn de tiu ĉi konvencio, necesas:

a) rekoni kaj protekti la valorojn kaj la sociajn, kulturajn, religiajn kaj spiritajn praktikojn de tiuj popoloj kaj de ĉi konsideri la econ de la problemoj kiujn ili havas kiel grupoj kaj kiel individuoj;

b) respekti la integrecon de la valoroj, praktikoj kaj institucioj de tiuj popoloj;

c) adopti, kun partopreno kaj kunlaborado de la tuŝitaj popoloj, dispoziciojn por mildigi iliajn malfacilaĵojn por alfronti novajn viv- kaj labor-kondiĉojn.

Artikolo 6

1. Aplikante la dispoziciojn de tiu ĉi konvencio, la registaroj devas:

a) konsulti la koncernatajn popolojn, per taŭgaj proceduroj, kaj speciale per iliaj reprezentaj institucioj, ĉiam kiam oni planas leĝdonajn aŭ administrajn dispoziciojn kiuj povas tuŝi ilin rekte;

b) disponigi la rimedojn per kiuj tiuj popoloj povu, almenaŭ egalece kun la aliaj sektoroj de la loĝantaro, libere kaj ĉiunivele partopreni en la decidadoj en la laŭelektaj institucioj kaj la administrataj kaj aliaj organismoj kiuj respondecas pri la politikoj kaj programoj kiuj koncernas ilin;

c) disponigi la rimedojn kiuj ebligas plene disvolvi la instituciojn kaj iniciatojn proprajn al tiuj popoloj kaj, laŭokaze, liveri al ili la necesajn resursojn por tio.

2. La konsultoj farataj per apliko de tiu ĉi konvencio farendas bonintence kaj en formo adaptita al la cirkonstancoj, por atingi interkonsenton aŭ konsenton pri la planataj dispozicioj.

Artikolo 7

1. La koncernataj popoloj devas havi la rajton decidi pri siaj propraj prioritatoj koncerne la procezon de disvolvado, en la mezuro laŭ kiu tiu havas efikon sur ilia vivo, iliaj kredoj, iliaj institucioj kaj ilia spirita bonfarto kaj sur la teroj kiujn ili okupas aŭ uzas alie, kaj kiom eble plej kontroli sian propran ekonomian, socian kaj kulturan disvolviĝon. Krome, tiuj popoloj devas partopreni en la ellaborado, realigo kaj taksado de la planoj kaj programoj de nacia kaj regiona disvolvado kiuj povas tuŝi ilin rekte.

2. La plibonigo de la viv- kaj labor-kondiĉoj de la koncernataj popoloj, kun ties partopreno kaj kunlaborado, devas esti unuaranga en la planoj de tutaĵaj ekonomiaj disvolvoplanoj de la regionoj en kiuj ili loĝas. La apartaj disvolvoprojektoj de tiuj regionoj devas ankaŭ konceptiĝi tiel ke ili favoru tian plibonigon.

3. La registaroj devas agi tiel ke, laŭokaze, fariĝu esploradoj kunlabore kun la koncernataj popoloj, por priaksi la eventualajn sociajn, spiritajn, kulturajn kaj mediajn efikojn de la planataj disvolv-agadoj sur ili. La rezultoj de tiaj esploradoj konsiderendas kiel baza kriterio por la realigo de tiuj agadoj.

4. La registaroj devas fari dispoziciojn, kunlabore kun la koncernataj popoloj, por protekti kaj flegi la medion en la teritorioj kiujn ili priloĝas.

Artikolo 8

1. Aplikante la nacian leĝaron pri la koncernataj popoloj de ĉi konsiderendas iliaj kutimoj aŭ ilia kutimjuro.

2. La koncernataj popoloj devas havi la rajton konservi siajn kutimojn kaj instituciojn se tiuj ne estas malkongruaj kun la fundamentaj rajtoj difinitaj de la nacia jursistemo kaj kun la homrajtoj rekonataj sur internacia

nivelo. Necesas starigi procedurojn, tiom kiom necesas, por solvi la eventualajn konfliktojn kaŭzantajn de la aplikado de tiu principo.

3. La aplikado de la paragrafoj 1 kaj 2 de tiu ĉi artikolo devas ne malhelpi la anojn de tiuj popoloj uzi la rajtojn rekonitajn al ĉiuj civitanoj kaj alpreni la respondajn devojn.

Artikolo 9

1. En la mezuro kongrua kun la nacia jursistemo kaj kun la homrajtoj rekonitaj internacivele, respektendas la metodoj kiujn la koncernataj popoloj uzas laŭkutime por subpremi deliktojn de iliaj membroj.

2. La institucioj kaj la tribunaloj taskita decidi en punaferoj devas tiukampe konsideri la kutimojn de tiuj popoloj.

Artikolo 10

1. Kiam pun-sankcioj laŭ la ĝenerala leĝaro estas trudataj al membroj de la koncernataj popoloj, necesas konsideri iliajn ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn ecojn.

2. Necesas preferi formojn de sankcio aliajn ol malliberigon.

Artikolo 11

La deviga liverado de personaj servoj, ĉu kompensataj aŭ ne, trudata iel ajn al membroj de la koncernataj popoloj, malpermesendas leĝe punende, escepte en okazoj kiujn la leĝo disponas por ĉiuj civitanoj.

Artikolo 12

La koncernataj popoloj devas ĝui protekton kontraŭ malrespekto de iliaj rajtoj kaj povi leĝe procesi, individue aŭ per interveno de iliaj reprezentaj organoj, por certigi la efektivan respekton de tiuj rajtoj. Disponoj farendas por certigi ke, en ĉiu leĝa proceduro, la anoj de tiuj popoloj povu kompreni kaj komprenigi, laŭbezono per buŝtrudukisto aŭ per aliaj efikaj rimedoj.

PARTO II. TEROJ

Artikolo 13

1. Aplikante la dispoziciojn de tiu ĉi parto de la konvencio, la registaroj devas respekti la specialan gravecon por la kulturo kaj la spiritaj valoroj de la koncernataj popoloj de ilia rilato kun la teroj aŭ teritorioj, aŭ kun ambaŭ, laŭ la kazo, kiujn ili okupas aŭ uzas alie, kaj speciale la kolektivajn aspektojn de tiu rilato.

2. La uzado de la termino teroj en la artikoloj 15 kaj 16 entenas la koncepton de teritorioj, kiu kovras la tutaĵon de la medio de la regionoj kiujn okupas la koncernataj popoloj aŭ kiujn ili uzas alie.

Artikolo 14

1. La rajtoj de proprieto kaj de posedo pri la teroj kiujn ili tradicie okupas rekonendas al la koncernataj popoloj. Krome, farendas dispozicioj en koncernataj okazoj por protekti la rajton de la koncernataj popoloj uzi la terojn ne ekskluzive okupatajn de ili, sed al kiuj ili havas tradicie aliron por siaj tradiciaj kaj vivtenaj agadoj. Aparta atento necesas tiurilate por la popoloj nomadaj kaj vagantaj terkulturistoj.

- La registaroj devas laŭbezone fari disponojn por identigi la terojn kiuj la koncernataj popoloj tradicie okupas kaj por garantiigi efikan protekton de iliaj rajtoj je proprieto kaj je posedo.
- Necesas starigi taŭgaj procedurojn kadre de la nacia jursistemo por decidi pri la postuloj pri teroj venantaj de la koncernataj popoloj.

Artikolo 15

- La rajtoj de la koncernataj popoloj pri la naturriĉaĵoj troviĝantaj sur iliaj teroj estas speciale konservendaj. Tiuj rajtoj entenas tiun, por tiuj popoloj, partopreni en la uzado, mastrumado kaj konservado de tiuj riĉaĵoj.
- En la okazo en kiu ŝtato havas la proprion de la mineraloj aŭ de la naturriĉaĵoj de la subgrundo aŭ de aliaj resursoj kiujn posedas tiuj teroj, la registaroj devas starigi aŭ daŭrigi procedurojn por konsulti la koncernatajn popolojn kun la celo determini ĉu kaj kiom la interesoj de tiuj popoloj estas minacataj, antaŭ ol realigi aŭ permesi ĉian programon de esplorado aŭ ekspluatado de la resursoj kiujn havas tiuj teroj. La koncernataj popoloj devas, ĉiam kiam eblas, partopreni en la avantaĝoj devenantaj de tiuj agadoj kaj devas ricevi justan kompensaĵon por ĉia damaĝo kiun ili eventuale suferas pro tiaj agadoj.

Artikolo 16

- Kun rezervo pri la sekvaj paragrafoj de tiu ĉi artikolo, la koncernataj popoloj devas ne esti delokataj el la teroj kiujn ili okupas.
- Kiam delokado kaj reinstalado de tiuj popoloj estas juĝataj esceptokaze necesaj, ili devas okazi nur kun ilia konsento, donita libere kaj kun plena kono de la afero. Se tiu konsento ne atingebblas, ili fareblas nur post konvena proceduro starigita de la nacia leĝaro kaj kiu enhavu, laŭokaze, publikajn enketojn en kiuj la koncernataj popoloj havu la eblecon esti efike reprezentataj.
- Ĉiam kiam eblas, tiuj popoloj devas havi la rajton reveni al siaj tradiciaj teroj, ekde kiam la kialoj kiuj motivis ilian delokadon kaj ilian reinstaladon ĉesas ekzisti.
- Kiam tia reveno ne eblas, ĉu determinite per interkonsento aŭ, en foresto de tia interkonsento, per rimedoj de taŭgaj proceduroj, tiuj popoloj devas ricevi, en kiom eble plej alta mezuro, terojn de kvalito kaj de jura statuso almenaŭ egalaj al tiuj de la teroj kiujn ili antaŭe okupis kaj kiuj ebligas al ili vivteni sin por la momento kaj certigi sian estontan disvolviĝon. Kiam la koncernataj popoloj esprimas preferon por mona aŭ natura kompensaĵo, ili devas esti sendamaĝitaj tiel, kun rezervo pri tiurilataj garantiuoj.
- La tiel delokitaj kaj reinstalataj personoj devas esti plene sendamaĝigitaj je ĉia perdo aŭ je ĉia damaĝo suferata de ĝi pro tio.

Artikolo 17

- La reĝimoj de transdono de rajtoj pri tero inter iliaj membroj starigitaj de la koncernataj popoloj respektendas.
- La koncernataj popoloj konsultendas

kiam oni ekzamenas ilian kapablon aliproprigi siajn terojn aŭ alie transdoni siajn rajtojn pri tiuj teroj ekster sian komunumon.

- La personoj kiuj ne apartenas al tiuj popoloj estas malebligendaj uzi la kutimojn de tiuj popoloj aŭ la nescion de iliaj membroj koncerne la leĝon por akiri proprion, posedon aŭ ĝuadon de teroj kiuj apartenas al ili.

Artikolo 18

La leĝo devas dispozicii taŭgajn sankciojn por ĉia ne permesita eniro sur la terojn de la koncernataj popoloj, aŭ por ĉia ne permesita uzado de tiuj teroj, kaj la registaroj devas fari disponojn por malebligi tiujn leĝrompojn.

Artikolo 19

La naciaj kampkulturaj programoj devas garantiigi al la koncernataj popoloj kondiĉojn ekvivalentajn al tiuj kiujn ĝuas la aliaj sektoroj de la loĝantaro koncerne:

- la disponigon de kromaj teroj kiam la teroj kiun disponas tiuj popoloj ne sufiĉas por certigi al ili la elementojn de normala ekzistado, aŭ por alfronti sian eventualan numeran kreskadon;
- la disponigon de rimedoj necesaj por ekspluati la terojn kiuj tiuj popoloj jam posedas.

PARTO III. REKRUTADO KAJ DUNGOKONDIĈOJ

Artikolo 20

- La registaroj devas, en la kadro de la nacia leĝaro kaj kunlabore kun la koncernataj popoloj, fari specialajn disponojn por certigi al la laboristoj apartenantaj al tiuj popoloj efikan protekton koncerne la rekrutadon kaj la dungokondiĉojn, laŭ la mezuro en kiu ili ne estas sufiĉe protektataj de la leĝaro aplikenda al la laboristoj ĝenerale.
- La registaroj devas fari ĉion kion ili povas por malebligi ĉian diskriminacion inter la laboristoj apartenantaj al la koncernataj popoloj kaj la aliaj laboristoj, nome koncernante:
 - aliron al dungo, inkluzive de kvalifikitaj dungoj, kaj la disponojn de promocio kaj postenaltiĝo;
 - egalan salajron por laboro de egala valoro;
 - kuracan kaj socian helpadon, sekurecon kaj sanon ĉe laboro, ĉiajn prestatojn de socia sekureco kaj ĉiajn aliajn dungodevenajn avantaĝojn, kaj loĝadon;
- [alilingve: d] la rajton je asociiĝo, la rajton je ĉiaj ne kontraŭleĝaj sindikataj agadoj kaj la rajton fari kolektivajn konvenciojn kun dungantoj aŭ kun dunganto-organizaĵoj.
- La deciditaj disponoj devas speciale celi al tio ke:
 - la laboristoj apartenantaj al la koncernataj popoloj, inkluzive de sezonaj, okazaj kaj migraj laboristoj dungitaj en kampkulturo aŭ en aliaj aktivecoj, same kiel tiuj dungitaj de laborist-pruntistoj, ĝuu la saman protekton kiun la naciaj leĝaro kaj praktikoj donas al la aliaj laboristoj

de tiuj kategorioj en la samaj sektoroj, kaj ke ili estu plene informitaj pri siaj rajtoj kaŭze de la laborleĝaro kaj pri la eblecoj de jura helpo kiun ili povas aliri;

- la laboristoj apartenantaj al tiuj popoloj ne estu submetitaj al laborokondiĉoj kiuj endanĝerigas ilian sanon, speciale pro elmetiĝo al pesticidoj aŭ al aliaj venenaj substancoj;
- la laboristoj apartenantaj al tiuj popoloj ne estu submetitaj al sistemoj de truddeviga rekrutado, inkluzive de ĉia servuto pro ŝuldo;
- [alilingve: d] la laboristoj apartenantaj al tiuj popoloj ĝuu la egalecon de ŝancoj kaj de traktado inter viroj kaj virinoj en la dungo kaj protekton kontraŭ seksa ĉikanado.

4. Aparta atento necesas por kreado de taŭgaj servoj de laborinspektado en la regionoj kie laboristoj apartenantaj al koncernataj popoloj plenumas salajratajn aktivecojn, en maniero por certigi la respekton al la dispozicioj de tiu ĉi parto de la konvencio.

PARTO IV. PROFESIA FORMADO, METIO KAJ KAMPARAJ INDUSTRIOJ

Artikolo 21

La membroj de la koncernataj popoloj devas povi ĝui rimedojn de profesia formado almenaŭ egalajn al tiuj disponigataj al la aliaj civitanoj.

Artikolo 22

- Disponoj farendas por instigi al libervola partopreno de la membroj de la koncernataj popoloj en la programoj de profesia formado kun ĝenerala aplikado.
- Kiam la ekzistantaj programoj de profesia formado kun ĝenerala aplikado ne respondas al la propraj bezonoj de la koncernataj popoloj, la registaroj devas, kune kun ties partopreno, fari tiel ke specialaj programoj kaj rimedoj de formado estu al ili disponigataj.
- La specialaj programoj de formado devas baziĝi sur la ekonomia medio, la socia kaj kultura situacio kaj la konkretaj bezonoj de la koncernataj popoloj. Ĉiu tiurilata esplorado farendas kunlabore kun tiuj popoloj, kiuj konsultendas pri la organizado kaj funkciado de tiuj programoj. Kiam eblas, tiuj popoloj devas iom post iom alpreni la respondecon de la organizado kaj funkciado de tiuj specialaj programoj de formado, se ili tiel decidas.

Artikolo 23

- La metioj, la kamparaj kaj komunumaj industrioj, la aktivecoj de vivtena ekonomio kaj la tradiciaj aktivecoj de la koncernataj popoloj, kiel ĉasado, fiŝkaptado, kaptiĉasado kaj kolektado, rekonendas kiel gravaj faktoroj de konservado de ilia kulturo kaj de ilia ekonomiaj sendependeco kaj disvolviĝo. La registaroj devas, kun partopreno de tiuj popoloj, kaj, laŭ okazo, agi tiel ke tiuj strukturoj estu fortigitaj kaj valorigataj.
- Laŭ peto de la koncernataj popoloj do-

nendas al ili, kiam eblas, taŭga teĥnika kaj financa helpo kiu konsideru la tradiciajn teĥnikojn kaj kulturajn ecojn de tiuj popoloj kaj la gravecon de daŭrigebla kaj egalrajta disvolviĝo.

PARTO V. SOCIA SEKURECO KAJ SANO

Artikolo 24

La reĝimoj de socia sekureco devas esti etendataj iom post iom al la koncernataj popoloj kaj esti sendistinge aplikataj al ili.

Artikolo 25

- La registaroj devas fari tiel ke taŭgaj sanservoj estu disponigataj al la koncernataj popoloj aŭ devas doni al ili la rimedojn kiuj ebligu al ili organizi kaj liveri tiajn servojn sub siaj propraj respondeco kaj kontrolo, tiel ke ili povu ĝui kiom eble plej altan nivelon de korpa kaj mensa sano.
- La sanservoj organizendas kiom eble plej sur komunuma nivelo. Tiuj servoj planendas kaj administrendas kunlabore kun la koncernataj popoloj kaj devas konsideri iliajn ekonomiajn, geografiajn, sociajn kaj kulturajn kondiĉojn kaj iliajn tradiciajn metodojn de antaŭmalhelpaj metodoj, praktikoj de kuracado kaj kuracilojn.
- La sansistemo devas doni la unuan rangon al formado kaj dungado de sanpersonaro de la lokaj komunumoj kaj koncentriĝi sur la primara sanpripri-zorgo, kaj samtempe resti en densa rilato kun la aliaj niveloj de sanservoj.

- La liverado de tiaj sanservoj kunordigendas kun la aliaj sociaj, ekonomiaj kaj kulturaj disponoj farataj en la lando.

PARTO VI. EDUKADO KAJ KOMUNIKILOJ

Artikolo 26

Disponoj farendas por certigi al la membroj de la koncernataj popoloj la eblecon akiri ĉiunivelan edukadon almenaŭ surbaze de egaleco kun la resto de la nacia komunumo. (daŭrigo paĝo 3)

Artikolo 27

- La programoj kaj edukservoj por la koncernataj popoloj disvolvendas kaj realigendas kunlabore kun ili por respondi al iliaj apartaj bezonoj kaj kovrendas ilian historion, iliajn kondiĉojn kaj iliajn valorojn, iliajn valorojn kaj iliajn ceterajn sociajn, ekonomiajn kaj kulturajn aspirilojn.
- La kompetenta instanco devas agi tiel ke la formado de la membroj de la koncernataj popoloj kaj ilia partopreno en la formulado kaj funkciado de la edukprogramoj estu certigitaj, por ke la respondeco pri funkciado de tiuj programoj povu iom post iom transdoniĝi al tiuj popoloj, laŭ la okazo.
- Krome, la registaroj devas rekonstrui la rajton de tiuj popoloj krei siajn proprajn instituciojn kaj edukrimedojn, kondiĉe ke tiuj institucioj respondu al la minimumaj normoj starigitaj de la kompetenta institucio konsulte kun

tiuj popoloj. Por tio liverendas al ili taŭgaj resursoj

Artikolo 28

1. Kiam tio realigeblas, donendas al la infanoj de tiuj popoloj instruado por lernigi al ili legi kaj skribi en ilia propra indiĝena lingvo aŭ en la lingvo kiu estas plej ordinare uzata de la grupoj al kiuj ili apartenas. Kiam tio ne realigeblas, la kompetentaj instancoj devas fari konsultadojn kun tiuj popoloj por adoptado de disponoj kiuj ebligu atingi tiun celon.

2. Taŭgaj disponoj farendas por certigi ke tiuj popoloj havu la eblecon akiri la regadon de la nacia lingvo aŭ de unu el la oficialaj lingvoj de la lando.

3. Disponoj farendas por konservi la indiĝenajn lingvojn de la koncernataj popoloj kaj subteni ilian disvolvadon kaj praktikadon.

Artikolo 29

La edukado devas celi doni al la infanoj de la koncernataj popoloj ĝeneralajn konceptojn kaj kapablojn kiuj helpas ilin plene kaj egalece partopreni la vivon de sia propra komunumo kaj tiun de la nacia komunumo.

Artikolo 30

1. La registaroj devas fari disponojn adaptitajn al la tradicioj kaj kulturoj de la koncernataj popoloj kun la celo konigi al ili iliajn rajtojn kaj devojn, speciale koncerne laboron, ekonomiajn eblecojn, demandojn de edukado kaj sano, sociajn servojn kaj la rajtojn kiuj rezultas el tiu ĉi konvencio.

2. Por tio oni uzas, se necese, skribajn tradukojn kaj la rimedojn de amaskomunikiloj en la lingvoj de tiuj popoloj.

Artikolo 31

Edukecaj disponoj farendas en ĉiuj sektoroj de la nacia komunumo, kaj aparte en tiuj kiuj estas plej rekte en kontakto kun la koncernataj popoloj, por elimini la antaŭjuĝojn kiujn ili eventuale havas pri tiuj popoloj. Por tio necesas klopodi por certigi ke la libroj pri historio kaj aliaj pedagogiaj materialoj donu justan, ĝustan kaj dokumentitan priskribon de la socioj kaj kulturoj de la koncernataj popoloj.

PARTO VII. KONTAKTOJ KAJ KUNLABORADO TRA LA LIMAJ

Artikolo 32

La registaroj devas fari taŭgajn disponojn, inkluzive per internaciaj interkonsentoj, por faciligi la kontaktojn kaj kunlaboradojn inter la indiĝenaj kaj tribaj popoloj tra la landlimoj, inkluzive en la ekonomia, socia, kultura, spirita kaj media kampoj.

PARTO VIII. ADMINISTRACIO

Artikolo 33

1. La registara instanco respondecas pri la demandoj traktataj en tiu ĉi konvencio devas certigi ke institucioj aŭ aliaj koncernaj meĥanismoj ekzistu por administri la programojn kiuj tuŝas la koncernatajn popolojn kaj ke

ili disponu pri la necesaj rimedoj por plenumi siajn funkciojn.

2. Tiuj programoj devas inkludi:

a) planadon, kunordigadon, realigadon kaj pritaksadon, kunlabore kun la koncernataj popoloj, disponojn priskribitajn en tiu ĉi konvencio;

b) submetadon al la kompetentaj instancoj de proponoj de leĝaj kaj aliaj disponoj kaj la kontroladon de la aplikado de tiuj disponoj, kunlabore kun la koncernataj popoloj.

PARTO IX. ĜENERALAJ DISPOZICIOJ

Artikolo 34

La eco kaj la atingopovo de la disponoj farendaj por efektiviĝi tiun ĉi konvencion determinendas elaste, konsidere al la apartaj kondiĉoj de ĉiu lando.

Artikolo 35

La aplikado de la dispozicioj de tiu ĉi konvencio devas ne atenci la rajtojn kaj avantaĝojn garantiatajn al la koncernataj popoloj kaŭze de aliaj konvencioj kaj rekomendoj, de internaciaj instrumentoj, de traktatoj aŭ de leĝoj, verdiktoj, kutimoj aŭ naciaj interkonsentoj.

PARTO X. FINAJ DISPOZICIOJ

Artikolo 36

Tiu ĉi konvencio revizias la konvencion pri la indiĝenaj kaj tribaj loĝantaroj, 1957.

Artikolo 37

La formalaj ratifoj de tiu ĉi konvencio estas komunikotaj al la Ĝenerala Direktoro de la Internacia Oficejo pri Laboro kaj de tiu registrotaj.

Artikolo 38

1. Tiu ĉi konvencio ligos nur la Membrojn de la Internacia Organizaĵo pri Laboro kies ratifo estos registrita de la Ĝenerala Direktoro.

2. Ĝi ekvalidos dek-du monatojn post kiam la ratifoj de du Membroj estos registritaj de la Ĝenerala Direktoro.

3. Poste tiu ĉi konvencio ekvalidos por ĉiu Membro dek-du monatojn post la dato en kiu ĝia ratifo estos registrita.

Artikolo 39

1. Ĉiu Membro kiu ratifis tiun ĉi konvencion povas malratifi ĝin ĉe la fino de dek jaroj post la dato de la komenca ekvalidiĝo de la konvencio, per akto komunikota al la Ĝenerala Direktoro de la Internacia Oficejo pri Laboro kaj de tiu registrotaj. La malratifo ekvalidos nur unu jaron post ĝia registriĝo.

2. Ĉiu Membro kiu ratifis tiun ĉi konvencion, kiu, ene de unu jaro post la fino de la dekjara periodo menciita en la antaŭa paragrafo, ne uzos la eblecon de malratifo menciitan en tiu ĉi artikolo estos ligita por nova dekjara periodo kaj, poste, povos malratifi tiun ĉi konvencion ĉe la fino de ĉiu dekjara periodo en la konciĉoj menciitaj en tiu ĉi artikolo.

Artikolo 40

1. La Ĝenerala Direktoro de la Internacia Oficejo pri Laboro sciigos al ĉiuj Membroj de la Internacia Organizaĵo pri Laboro la registriĝon de ĉiuj ratifoj kaj malratifoj kiuj estos al li komunikotaj de la Membroj de la Organizaĵo.

2. Sciigante al la Membroj de la Organizaĵo la registradon de la dua ratifo komunikota al li, la Ĝenerala Direktoro atentigos la Membrojn de la Organizaĵo pri la dato je kiu ekvalidos tiu ĉi konvencio.

Artikolo 41

La Ĝenerala Direktoro de la Internacia Oficejo pri Laboro komunikos al la Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj nacioj, cele al registrado, konforme al la artikolo 102 de la Ĉarto de la Unuiĝintaj nacioj, kompletajn informojn pri ĉiuj ratifoj kaj ĉiuj malratifoj kiujn li estos registrinta konforme al la ĉi-antaŭaj artikoloj.

Artikolo 42

Ĉiufoje kiam ĝi juĝas tion necesa, la Estraro de la Internacia Oficejo pri Laboro prezentos al la Ĝenerala Konferenco raporton pri la aplikado de tiu ĉi konvencio kaj ekzamenos ĉu necesos enskribi en la tagordon de la Konferenco la demandojn de ĝia kompleta aŭ parta reviziado.

Artikolo 43

1. Kaze ke la Konferenco adoptas novan konvencion kun kompleta aŭ parta revizio de tiu ĉi konvencio, kaj escepte se la nova konvencio disponos alie:

a) la ratifo, fare de Membro, de la nova revizia konvencio sekvigus plenrajte, senkonsidere la ĉi-supran artikolon 39, tujan malratifon de tiu ĉi konvencio, kun la rezervo ke la nova revizia konvencio ekvalidis;

b) ekde la ekvalidodato de la nova revizia konvencio, tiu ĉi konvencio ĉesus esti malfermita al ratifado de la Membroj.

2. Tiu ĉi konvencio restus ĉiukaze valida en sia formo kaj ligus tiujn Membrojn kiuj ratifis ĝin kaj kiuj ne ratifus la revizian konvencion.

Artikolo 44

La franca kaj angla versioj de la teksto de tiu ĉi konvencio estas egale aŭtentaj.

El la franca kaj angla originaloj tradukis Vilhelmo Lutermano.

Lucien Sève: Ĉu reguligi la financon aŭ preterpasi kapitalismon? - Markso kontraŭatakas

Malestimataj de la eŭropaj socialistaj partioj kiel „simplismaj malnovaĵoj” kun kiuj oni devas rompi, preteratentataj ĉe la universitatoj kie ili estis longtempe instruataj kiel bazo de ekonomia analizo, la laboraĵoj de Karlo Markso vekas denove intereson. Ĉu la germana filozofo ne detale analizis la meĥanikon de la kapitalismo, kies kapricaj saltoj senorientigas la fakulojn? Dum la iluziistoj pretendas „moraligi” la financon, Markso malkaŝis la sociajn rilatojn.

ILI PRESKAŬ SUKCESIS persvadi nin: la historio finiĝis, la kapitalismo, je ĝenerala kontentiĝo, estas la definitiva formo de socia organiziĝo, la „ideologia venko de la

dekstro”, laŭ la franca ĉefministro, estis klare agnoskita, kaj nur kelkaj nekuraĝeblaj vant-revuloj ankoraŭ revigas pri ebla alia estonto.

La sensacia financa tertremo de oktobro 2008 tuj forblovis tiun konstruaĵon el la mensoj. En Londono, la *Daily Telegraph* skribas: „La 13-an de oktobro 2008 restos en la historio kiel la tago en kiu la brita kapitalisma sistemo rekonis esti fiaskinta.”¹ En Novjorko, manifestantoj svingas antaŭ *Wall Street* ŝildojn kun „Markso pravis!” En Frankfurt, eldonisto anoncas ke lia vendo de la *Kapitalo* triobliĝis. En Parizo konata revuo en tridekpaĝa dosiero analizas, pri tiu kiun oni diris definitive morta, „la kialojn de renaskiĝo”.² La historio remalfermiĝas...

Profundiĝi en Markson signifas multajn malkovrojn. Linioj skribitaj antaŭ jarcento kaj duono ŝajnas tie paroli pri ni kun akra aktualeco. Ekzemplo: „Pro la fakto ke la financa aristokratio diktis la leĝojn, gvidis la ŝtat-mastrumadon, disponis pri ĉiuj konstituciaj publikaj povoj, superregis la publikan opinion en la fakto kaj per la gazetararo, reproduktiĝis en ĉiuj sferoj, de la kortumo ĝis la fi-kafejo, la sama prostituado, la sama senhonta trompado, la sama soifo riĉiĝi, ne per produktado, sed per ŝtelado de aliies riĉaĵo.”³ Markso priskribis tie la staton de la aferoj en Francio antaŭ la revolucio de 1848... Oni kredas sonĝi.

Sed, trans la mirfrapaj similaĵoj, la epokdiferencoj erarigas ĉian rektan transponadon. La denove evidenta aktualeco kuŝas multe pli profunde en tiu genia *Kritiko de la politika ekonomio* kiu restas *La Kapitalo* de Markso.

De kie venas efektive la amplekso de la nuna krizo? Se legi la dominantajn skribaĵojn, oni devus kulpigi la nefidindecon de la rafinitaj financ-produktoj, la nekapablon de la kapital-merkatoj reguligi sin mem, la tro malaltan moralon ĉe la monuloj... Mallonge, la mankojn de la sola reganta sistemo kiun, kontraste al la „reala ekonomio”, oni nomas la „virtuala ekonomio” - kvazaŭ oni ne ĵus spertis kiom *reala* estas ankaŭ ĝi.

Tamen, la komenca krizo de la *subprime* naskiĝis ja el la kreskanta nepagipovo de milionoj da usonaj mastrumejoj pro la enŝuldiĝo de la kandidatoj je proprieto. Tio devigas koncedi ke, fine de la saldo, la dramo de la „virtualo” havas siajn radikojn en la „realo”. Kaj la „realo” ĉi-teme estas la tutmondigita tutaĵo de la popolaj aĉetpovoj. Sub la eksplodo de la spekulativa veziko, formita de la pufiĝo de la financo, troviĝas la universala akaparo, fare de la kapitalo, de la riĉaĵo kreita de la laboro, kaj, en tiu distordo kie ties salajra parto malaltiĝis je pli ol dek poentoj - kolosa malaltiĝo -, estas kvarona jarcento da malabundo por la laboristoj en la nomo de la novliberala dogmo.

La trumpetoj de moraligo

ĈU MANKO DE financa regulado, de mastruma respondeco, de borsa moralito? Certe. Sed pensi sentabue devigas iri multe pli antaŭen: dubigi la dogmon ĵaluze konservatan de sistemo mem super ĉia suspekto, primediti tiun lastan kialon de la aferoj kiun Markso nomas „ĝenerala leĝo de la kapitalisma akumulado”. Tie, kie la sociaj kondiĉoj de la produktado estas privata proprieto de la kapitalista klaso, montras li, „ĉiuj rimedoj kiuj celas disvolvi la produkt-

1 *The Daily Telegraph* Londono, 14-a de oktobro 2008.

2 *Le Magazine littéraire*, n-ro 479, Parizo, oktobro 2008.

3 Karl Marx, *Les Luttes de classe en France [La klasbataloj en Francio]*, Editions sociales, Parizo, 1984, p. 84-85; cit. en *Manière de voir*, n-ro 99, „L'Internationale des riches”, junio-julio 2008.

adon renversiĝas en rimedojn de dominado kaj de ekspluatado de la produktanto”, kiu estas oferata al akaparo de riĉaĵo fare de la posedantoj, akumulado kiu nutras sin mem kaj do tendencas fariĝi freneza. „La akumulado de riĉaĵo je unu poluso” havas kiel nepran alian flankon „laŭproporcion akumuladon de mizero” ĉe la alia poluso, de kie naskiĝas neeviteble la antaŭkondiĉoj de senbride perfortaj komercaj kaj bankaj krizoj.⁴ Temas ĉi tie ja pri ni.

La krizo eksplodis en la sfero de la kredito, sed ĝia detrupovo formiĝis en tiu de la produktado, kun la senĉese pli malegaleca divido de la plusvaloroj inter laboro kaj kapitalo, cunamo kiun ne povis haltigi senrimeda sindikatismo kiun eĉ akompanis socialdemokrata maldekstro kiu traktis Marks-on kiel mortintan hundon. Oni do imagas kion povas valori la solvoj de la krizo - „moraligo” de la kapitalo, „regulado” de la financo - trumpetataj de politikistoj, administristoj, ideologoj kiuj hieraŭ ankoraŭ draŝis la plej etan dubon pri la ĝusteco de la tut-liberaligo.

Ĉu „moraligo de la kapitalo”? Jen slogano kiu meritas premion de nigra humuro. Se efektive ekzistas ordo de konsideroj kiu forblovas ĉian reĝimon de la sankta libera konkurenco, tiam estas ja la *moralita* konsidero: la cinika efikeco gajnas tie kun sama certeco kiel la falsa mono forpelas la bonan. La „etika” zorgo estas reklameca. Markso solvis la demandon en kelkaj linioj de sia antaŭparolo al la *Kapitalo*: „Mi neniel pentras rozkolora la personecon de la kapitalisto kaj de la proprietulo de grundo”, sed „malpli ol ĉia alia, mia perspektivo, ĉe kiu la disvolvado de la socio kiel ekonomia organizo estas komprenata kiel procezo de natur-historio, povus respondeciĝi la individuon pri la rilatoj de kiuj li socie restas produkto.”⁵... Jen pro kio certe ne sufiĉos distribui kelkajn vangofrapojn por „refondi” sistemon en kiu la profito restas la sola kriterio.

Ne ke oni estu indiferenta pri la morala aspekto de la aferoj. Eĉ male. Sed, se konsideri ĝin serioze, la problemo apartenas al tute alia ordo ol la deliktemo de fimastroj, la senkonscienco de frenezaj makleristoj aŭ eĉ la maldececo de oraj paraŝutoj. Kion la kapitalismo havas da senmorala tiurilate, transe de ĉia individua konduto, estas ĝia principo mem: la homa agado kiu kreas la riĉaĵojn havas tie la statuson de *varo*, kaj estas do traktata tie *ne kiel celo, sed kiel simpla rimedo*. Ne necesas legi Kanton por vidi en ĝi la konstantan fonton de malmoraleco de la sistemo.

Se oni volas vere moraligi la ekonomian vivon, necesas ataki vere tion kio malmoraligas ĝin. Tio pasas certe - amuza remalkovraĵo de multaj liberaluloj - tra rekonstruado de ŝtataj reguloj. Sed por tio baziĝi sur la ŝtato de Nicola Sarkozy, la ŝtato de impostŝirmilo por riĉuloj kaj de privatigo de la Poŝto, tio estas ekstreme naiva - aŭ hipokrita. Ekde kiam oni pretendas aliri la demandon de regulado, nepras reveni al la bazaj sociaj rilatoj - kaj jen, denove, Markso proponas al ni ne preterireblan analizon de aktualeco: tiun de la *fremdigo*.

En sia unua senco, ellaborita en famaj tekstoj de lia junaĝo⁶, la koncepto signas tiun malbenon kiu devigas la salajrulon de la kapitalo produkti la riĉaĵon por aliuloj nur per produktado de sia propra materia kaj morala senhaveco: li devas perdi sian vivon por gajni ĝin. La multforma malhum-

4 Karl Marx, *Le Capital*, livre I, Editions sociales, 1983, aŭ Presses universitaires de France, Parizo, 1993, p. 724.

5 *Le Capital*, libro I, p. 6.

6 *Le Capital*, libro I, p. 6.

aneco kiu amase viktimitigas la salajrulojn de hodiaŭ⁷, de la apero de labormalsanoj ĝis la malsanoj de la borsaj maldungitoj tra tiuj de la malalte salajrataj homoj, ilustras la trafekon de tia analizo.

Sed, en siaj laboraĵoj de matura aĝo, Markso donas al la fremdigo ankoraŭ pli vastan sencon: la kapitalo, kiu reproduktas senĉese la radikalan disigon inter produktimedoj kaj produktantoj - fabrikoj, oficejoj, laboratorioj ne apartenas al tiuj kiuj laboras tie -, iliaj produktaj kaj konaj agadoj, ne kolektive majstrataj ĉe la bazo, estas elmetitaj al la anarĥieco de la sistemo de konkurenco, kie ili transformiĝas en nekontrolablajn procezojn teĥnologiajn, ekonomiajn, politikajn, ideologiajn, en gigantajn blindajn fortojn kiuj subigas kaj dispremas ilin.

La homoj ne faras sian historion, sed la historio faras ilin. La financa krizo terure ilustras tiun fremdigon, same kiel la ekologia krizo kaj tiu kiun necesas nomi la antropologia krizo, tiu de la homaj vivoj: neniu volis tiujn krizojn, sed ĉiuj suferas ilin.

Ĝuste el tiu „ĝenerala senposedigo”, ĝis-ekstreme praktikata de la kapitalismo, reaperas nebrideble la ruinigaj forestoj de interkonsentitaj reguladoj. Do, tiu kiu pretendas „reguligi la kapitalismon” estas tute certe politika ĉarlatano. Vere reguligi postulas multon pli ol ŝtatan intervenon, kiom ajn necesa tiu povas esti, ĉar kiu reguligos la ŝtaton? Nepras la reposedigo de la produktiloj fare de la materiaj-intelektaj produktantoj fine rekonataj kiel tiaj kiaj ili estas, kaj kiaj ne estas la akciuoj: la *kreantoj* de la socia riĉaĵo, kiuj havas, kiel tiaj, necedeblan rajton partopreni en la decidoj de mastrumado ĉe kiuj decidiĝis pri ilia vivo mem.

Fronte al sistemo kies evidenta malkapablo reguligi sin kosta al ni eksterordinaran prezon, necesas, laŭ Markso, senprokraste komenci la preterpasadon de la kapitalismo, longan marŝon al alia socia organizo en kiu la homoj, en novaj formoj de asociigo, kontrolas kune siajn sociajn potencojn kiuj freneziĝis. Ĉio alia estas blufado, do kun nepra tragika elreviĝo.

Oni ofte ripetas ke Markso, forta en sia kritiko, estus sen kredindeco pri la solvoj, ĉar lia komunismo, „provita” en la Oriento, estus radikale fiaskinta. Kvazaŭ tiu mortinta stalina-breĥneva socialismo havus ion vere komunan kun la komunisma celaro de Markso, cetere kies realan sencon preskaŭ neniu strebas alpreni, kiu estas ĉe la antipodoj de tio kion la kuranta opinio komprenas sub la vorto „komunismo”. Fakte, sub niaj okuloj skiziĝas tute alie tio, kio povos esti, en aŭtente marka senco, la „preteriro” de la kapitalismo en la 21-a jarcento.⁸

Sed ĉi tie oni haltigas nin: voli alian sacion estus mortiga utopio, ĉar oni ne *ŝanĝas la homon*. Kaj la „homo”, la liberala pensado scias kio ĝi estas: animalo kiu esence apartenas ne al la homa mondo sed al ties genoj, kalkulisto movata de sia sola intereso de individuo - *Homo aëconomicus*⁹ - kun kiu do eblas nur socio de privataj proprietuloj en „libera kaj sendifekta” konkurenco.

Nu, ankaŭ tiu pensado bankrotis. Sub la evidenta ruiniĝo de la praktikata liberalis-

7 Vd Christophe Dejours, *Travail, usure mentale*, Bayard, Parizo, 2000; „Aliénation et clinique du travail”, *Actuel Marx*, n-ro 39, „Nouvelles aliénations”, Parizo, 2006.

8 En *Un futur présent, l'après-capitalisme [Estonta estanteo, la postkapitalismo]*, La Dispute, Parizo, 2006, Jean Sève pentras impresan bildon de tiuj komencoj de preterpasado observeblaj en tre diversaj kampoj.

9 Vd interalie Tony Andréani, *Un être de raison. Critique de l'Homo aëconomicus*, Syllepse, Parizo, 2000.

mo okazas malpli brue la bankroto de la teoria liberalismo kaj de ties *Homo aëconomicus*. Duobla bankroto. Unue scienca. En la momento en kiu la biologio liberiĝas de simplisma „ĉio genetika”, okulfrapas la naviĵoj de la ideo de la „homa naturo”. Kie estas la genoj, trumpete anoncitaj, de la inteligento, de la fideleco aŭ de la samseksemo? Kiu kulture edukita menso povas kredi ke la pederastio, ekzemple, estas hereda?

Kaj etika bankroto. Ĉar tio, kio delonge patronas la ideologion de la konkurenca individuo, estas malhumaniga pedagogio de „fariĝu mortigisto”, programita likvidado de la sociaj solidarecoj ne malpli drameca ol la fandiĝo de la polusaj glacioj, ĉiurilate malkivilizado fare de la frenezo de facila mono kiu devus honte ruĝigi tiujn kiuj aŭdacas anonci „moraligon de la kapitalismo”. Sub la historia elruiniĝo en kiun dronas kaj nin dronigas la diktatoreco de la financo, troviĝas tiu de la liberala retoriko pri „la homo”.

Kaj tie estas la plej neatendita el la aktualecoj de Markso. Ĉar tiu genia kritikanto de la ekonomio estas ankaŭ, per la sama movo, la iniciatinto de vera revolucio en la antropologio. Dimensio nekredeble nekonata de lia pensado kiun ne eblas prezenti en kelkaj linioj. Sed lia sesa tezo pri Feŭerbaĥo montras ĝian spiriton per du frazoj: „La homa esenco ne estas abstraktaĵo ennaskita de la aparte traktata individuo. En sia realeco ĝi estas la tutaĵo de la sociaj rilatoj.” Male al tio kion imagas la liberala individuismo, la historie evoluinta „homo” estas *la mondo de la homo*. Jen ekzemple, kaj ne en la genaro, troviĝas la lingvo. Jen la fonto el kiu ĉerpas niaj superaj psiaj funkcioj, kiel bonege montris tiu marksisto longe nekonata kiu estis unu el la grandaj psihologoj de la 20-a jarcento: Lev Vigocki, kiu malfermas la vojon al tute alia vizio de la homa individueco.

Ĉu Markso estas aktuala kaj eĉ pli ol oni pensas? Jes, se oni bonvolas aktualigi la tradician bildon kiun oni imagas tro ofte pri li.

Lucien SÈVE.

Elfrancigis Vilhelmo Lutermano

Alain Gresh: Nova mondo Leviganta postusona jarcento

JEN KELKAJ novaĵoj kolektitaj el gazetoj dum la somero 2008, eĉ antaŭ ol alveno de la uragano kiu detruas la financan planedon: la nombro da ĉinaj interret-uzantoj preterpasis tiun de la usonaj, kaj Usono prezentas nun nur 25 % de la retrafiko, kontraŭ pli ol la duono antaŭ dek jaroj; la provo revigligi la Dohan ciklon de internaciaj komercaj intertraktadoj fiaskis, ĉefe pro la rifuzo de Hindio kaj Ĉinio oferi siajn jam malriĉigitajn terkulturistojn sur la altaro de la liberkomerco; Rusio defendis, dum la georgia krizo, siajn naciajn interesojn en Kaŭkazio spite al la duoninsistaj protestoj de Vaŝingtono.

Tiuj diversaj faktoj, inter multaj aliaj, atestas jam pri rekonstruado de la internaciaj rilatoj: la finon de la sendivida dominado de la Okcidento, kiu trudiĝis en la unua duono de la 19-a jarcento. La malfortiĝo de la financsistemo povas nur akceli tiun movadon de okcidenta retiriĝo. „Fino de la arroganteo”, titolis la germana semajnuo *Der Spiegel*, la 30-an de septembro, kun jena subtitolo: „Usono perdas sian dominantan ekonomian rolon”. Per iu el tiaj ironioj, kies sekreto havas la Historio, tio okazis malpli ol du jardekojn post la disfalo de la „socialisma tendaro” gvidata de Sov-

etunio kaj je la videbla triumfo de la principoj de la liberala ekonomio.

Fino de la okcidenta hegemonio

ESTAS ĈIAM danĝere antaŭdiri. En 1983, du jarojn antaŭ la alveno de s-ro Miĥail Gorbaĉov en la Kremlo, Jean-François Revel antaŭdiris la finon de la demokratioj, nekapablaj batali kontraŭ „la plej timinda el siaj eksteraj malamikoj, la komunismo, aktuala variaĵo kaj perfekta modelo de totalismo”.¹ Kelkajn jarojn poste, Francis Fukuyama anoncis la „finon de la historio” kun la sendivida triumfo de la usona-okcidenta modelo... Post la unua Golfmilito (1990-1991), multaj observantoj antaŭsentis la matenkrepuskon de usona 21-a jarcento.

Dek-kvin jarojn poste aperas alia interkonsento, ŝajne pli proksima de la realeco: ni eniras „postusonon mondon”.² Kiel rekonas la Blanka Libro pri Defendo kaj Nacia Sekureco adoptita de la franca registaro en junio 2008, „la okcidenta mondo, do esence Eŭropo kaj Usono, jam ne havas la ekonomian kaj strategian iniciaton en la senco en kiu ĝi ankoraŭ havis ĝin en 1994”.³

Ĉu la mondo estos multpolusa? Sendube Usono restos, ankoraŭ por longaj jaroj, la dominanta potenco, kaj ne nur sur milita nivelo. Ĝi devos tamen konsideri la aperon de povocentroj en Pekino kaj en Nov-Delĥio, en Brazilo kaj en Moskvo. La enmarĉiĝo de la intertraktadoj de la Monda Organizaĵo pri Komerco (MOK), la sakstrato de la irana atomkrizo kaj la surprizaj komplikigoj de la intertraktadoj kun Nord-Koreio konfirmas ke Usono, eĉ alianco kun la Eŭropa Unio, jam ne kapablas trudi sian vidpunkton kaj bezonas aliajn partnerojn por solvi la krizojn.

Oni povus aldoni al tiuj novaj potencoj tutan serion da agantoj kiujn elvokas, en sia priskribo de „senpolusa mondo”, s-ro Richard Haass, iama alta respondeculo en la registaro Bush (patro), poste de la Ŝtadepartemento, nuna prezidanto de la Council on Foreign Relations (Novjorko): li nombras, senorde, la Internacian Agentejon pri Energio (IAE), la Organizaĵon de Kullaborado de Ŝanhajo⁴, la Mondan Organizaĵon pri Sano (MOS) kaj la regionajn organizaĵojn; la urbojn kiel Ŝanhajon aŭ San-Paŭlon, la satelitajn komunikilojn, de Al-Ĵazira ĝis CNN, la milicojn, de la Hizbolaho ĝis la talibanoj, la kartelojn de fido, neregistarajn organizaĵojn... Kaj li konkludas: „La mondo de hodiaŭ havas pli kaj pli dispartigitan potencon ol koncentriĝon de potenco.” Kiom ajn, la ŝtatoj pri kiuj oni antaŭdiris malfortiĝon sub la batoj de la tutmondiĝo, volas sian lokon en la suno. Ĉinio, Hindio, Rusio kaj Brazilo firmigas siajn ambiciojn kaj kontestas internacian ordon kiu marĝenigus ilin. Aliaj landoj, de Irano ĝis Sud-Afriko, tra Israelo, la sudamerikaj nacioj, Indonezio, kun pli limigitaj celoj, defendas siajn „egoismajn” interesojn kun decidemo.

1 *Comment les démocraties finissent [Kiel finiĝas la demokratioj]*, Grasset, Parizo, 1983.

2 Vd Fareed Zakaria; *The Post-American World*, Norton, Novjorko, 2008; kaj la recenzon de tiu libro fare de Hubert Védrine (*Le Monde diplomatique*, septembro 2008).

3 *Défense et Sécurité nationale. Le Livre blanc*, Odile Jacob, La Documentation française, Parizo, 2008, p. 34.

4 «The Age of Nonpolarity: What Will Follow U. S. Dominance» (La epoko de senpoluseco: kio sekvos la dominadon de Usono), Foreign Affairs, Novjorko, majo-junio 2008.

5 Oficiale starigita en 2001, la OKŜ entenas Ĉinion, Rusion, Kazahion, Kirgizion, Taĝikion kaj Uzbekion. Al ĝi aliĝis kvar observantaj landoj, Hindio, Pakistano, Irano kaj Mongolio.

Neniu el tiuj ŝtatoj estas animita de tutmonda ideologio, kiel estis Sovetio. Neniu prezentas sin kiel alternativa modelo. Ĉiuj akceptis, pli aŭ malpli, la merkatekonomion. Sed neniu eĉ songas pri kompromisoj kun siaj naciaj interesoj. Ĉiu batalas unue por regi la mineralajn krudmaterialojn kiuj fariĝis pli malabundaj kaj pli multekostaj - unuavice petrolon kaj gason -, por protekti sian kapablon nutri sian loĝantaron kun terkultura produktado nesufiĉa kaj minacata de la klimata varmiĝo. Duavice ili protektas siajn geopolitikajn interesojn bazitajn sur politika vizio kaj sur tre longa historio: Tajvano kaj Tibeto por Ĉinio; Kaŝmiro por Hindio kaj Pakistano; Kosovo por Serbio; Kurdio por Turkio. Tiuj konfliktoj ne estas solvitaj en feliĉa tutmondiĝo - male, ili mobilizas pli ol iam ajn grandajn amasojn kaj ne estas estingiĝantaj.

Simpla rigardo sur la mondan mapon indikas ke la granda plimulto de tiuj streĉiĝoj okazas ĉirkaŭ „kriza arko” kiu iras, laŭ la Blanka Libro, de la Atlantiko ĝis la Hinda Oceano. Ĝiaj redaktistoj avertas kontraŭ „la risko, nova, de interligiĝo de la konfliktoj [kiuj] skiziĝas, inter la Proksima kaj Meza Oriento kaj la regiono de Pakistano kaj Afganio. La ekzisto de programoj, ĝenerale kaŝitaj, de atomaj, ĥemiaj kaj biologiaj armiloj gravigas tiun danĝeron, dum la landoj de tiuj regionoj akiras grandnombre, malkaŝe aŭ ne, militajn kapablojn apogitajn sur aeraj portiloj kaj raketoj. La malstabiligo de Irako, dividita inter konkurencaj komunumoj, povas etendiĝi al la Mez-Oriento. La malstabileco en tiu geografia arko povas rekte aŭ malrekte tuŝi niajn interesojn. La eŭropaj landoj ĉeestas milite pro diversaj kialoj en Ĉadio, en Palestino, en Libano, en Irako kaj en Afganio. En tiuj kondiĉoj, Eŭropo kaj Francio estas verŝajne alvokitaj estonte engaĝiĝi ankoraŭ pli en la tuta zono por helpi ĉe antaŭmalhelpado kaj solvado de la krizo.”⁶

„Krizo arko” de Atlantiko ĝis Hinda Oceano

ANALIZO KIU konfirmas tiun de la plej multaj usonaj strategiistoj kaj kiun resumis s-ro William Burns, grava respondeculo de la Ŝtatepartemento: „Antaŭ dek jaroj, Eŭropo estis la centro de la usona eksterlanda politiko. (...) Nun ĉio ŝanĝiĝis. (...) La Proksima-Oriento okupas por la prezidanto [George W.] Bush, por la Ŝtatekretario [Condoleezza] Rice, kaj ĝi okupas por iliaj posteuloj, la lokon kiun havis Eŭropo ĉe la diversaj administracioj dum la 20-a jarcento.”⁷ La fakto ke tiu regiono entenas la plej grandan petrolrezervon de la mondo, en tempo en kiu la kurzo de la barelo restas tre alta - malgraŭ ĝia ĵusa malaltiĝo - kontribuas al kresko de la strategia karaktero de la „Granda Mez-Oriento”.

Tiel klarigeblas koncentriĝo senprecedenca post la fino de la dua mondmilito de okcidentaj trupoj en la regiono, de Irako ĝis Ĉadio, de Afganio ĝis Libano. Metante ĉiujn ĉi batalojn en la kadron de sia „milito kontraŭ la terorismo”, Usono kontribuis al kreado de „internacio de rezistado”, internacio ofte diverselementa, dividita kaj kiun nenio profunde ligas ol la kontraŭstaro al la usona hegemonio.

Tiu rezistado montriĝas ankaŭ en la grava kampo de ekonomio. Male al la antaŭaj krizoj (azia, rusa ktp), la nuna financa uragano konfirmas la marĝenigon de la internaciaj organizaĵoj, la Internacia Mon-Fonduso (IMF) kaj la Monda Banko. Komence de la jarmilo, multaj landoj - Rusio, Tajlando, Argentino, Brazilo, Serbio, Indonezio ktp - decidis anticipi repagi sian ŝuldon al

la IMF⁸ por sendependiĝi de la aksiomaj truditaj de la internaciaj organizaĵoj.

Ĉu la „interkonsento de Vaŝingtono”⁹ estos anstataŭigota de la „interkonsento de Pekino”? Tiu resumigus, laŭ la ekonomikisto Joshua Cooper Ramo, per tri teoremoj¹⁰ kiuj difinas la manieron laŭ kiu Suda lando povas meti sin sur la mondan ŝaktabulon: emfazo de ennovigo; neceso konsideri ne nur la kreskon de la malneta enlanda produkto (MEP), sed la vivkvaliton kaj certan formon de egaleco kiu evitu ĥaŭson; fine, graveco de sendependeco kaj memdeterminado en la decidoj kaj rifuzo lasi al aliaj (nome al okcidentaj potencoj) la eblecon trudi sian vidpunkton.

Sekurecaj implicoj de la ter-varmiĝo

TIU KONCEPTO vekis multajn debatojn kaj kritikojn¹¹ - ekzemple pri la demando ĉu Ĉinio fakte proponas „novan modelon”, dum la malegalecoj kreskas kaj ĝi akceptis aliĝi al la tutmondiĝo. Sed ĝi ebligas kompreni ke, kiel neniam antaŭe post la malkoloniiĝo, la landoj de la Sudo havas la eblecon fari sendependajn politikojn, trovi partnerojn - ŝtatojn kaj entreprenojn - kiuj ne viciĝas laŭ la vidpunkto de Vaŝingtono. Novaj rilatoj teksiĝas, kiel pruvas la pintkunvenoj de Ĉinio kun Afriko aŭ la kunveno de la ministroj pri eksterlandaj aferoj de la BRIC (Brazilo, Rusio, Hindio, Ĉinio), la 26-an de septembro en Novjorko. Landoj povas decidi disvolvoplanojn sen pasi sub la jugon de la „vaŝingtona interkonsento”.

Kroma grava transformiĝo tuŝas la geopolitikan arĥitekturon de la mondo. La 17-an de aprilo 2007, la Konsilantaro pri Sekureco de la Unuiĝintaj Nacioj faris, por la unua fojo, kunvenon dediĉitan al la politikaj kaj sekurecaj implicoj de la varmiĝo de la planedo. Tiu dimensio estas nun entenata en la strategiaj pripensadoj, ĉu en Usono, en Francio aŭ en Aŭstralio.¹² Sen eniri en detalojn, la ekstremaj kondiĉoj tuŝos la nutraŭ-rikoltojn, favorigos la disvastiĝon de epidemioj, kaj la altiĝo de la akvoj ne nur kreos milionojn da ekologiaj rifuĝantoj - 150 milionojn en 2050 laŭ certaj taksoj -, sed vigligos la batalon pri la divido de teritorioj, ĉar la malapero de la atoloj aŭ insuloj tuŝas la Ekskluzivajn Ekonomiajn Zonojn (EEZ).¹³ [13] La ega altiĝo de la prezoj por nutraĵoj, siavice, endanĝerigas la stabilecon de multaj landoj. Ekde nun, kun la certiĝo de multaj vojoj de disvolvado, kun multpoluseco, estas kontestata ne nur la ekonomia dominado de la Okcidento, sed ankaŭ ĝia rajto nomi la Bonon kaj la Malbonon, difini la internacian juron, enmiksiĝi en la aferojn de la mondo nome de moralo aŭ de homhelpemo. La franca eksa ministro pri eksterlandaj aferoj Hubert Védrine klarigas ke la Okcidento perdis „la mono-

8 Vd Jacques Sapir, *Le nouveau XXIe siècle. Du siècle „américain” au retour des nations [La nova 21-a jarcento. De la „usona” jarcento al reveno de la nacioj]*, Seuil, Parizo, 2008, aparte p. 164-170.

9 La interkonsento de Vaŝingtono estas esprimo kreita en 1989 de la ekonomikisto John Williamson. Ĝi signas samtempe la liberalajn disvolvigojn truditajn de la internaciaj institucioj (inter ili la IMF) al la ŝtatoj en malfacila situacio kaj la pli grandan atenton - teorie - de tiuj por la „homrajtoj”.

10 Vd *The Beijing Consensus*, The Foreign Policy Center, Londono, 2004.

11 Vd, ekzemple, Arif Dirlik, *Beijing Consensus: Beijing « Gonshi ». Who recognizes Whom and to What End ?*.

12 Alan Dupont, „The Strategic Implications of Climate Change”, *Survival*, The International Institute for Strategic Studies, Londono, junio-julio 2008.

13 La EEZ originas en la Konvencio de la Unuiĝintaj Nacioj pri la Mar-Juro (1982). Ĝi permesas al ŝtato uzi certan nombron da rajtoj interne de linio de 200 mejloj (370 kilometroj) de siaj marbordoj.

polon pri la historio”, la monopolon pri la „granda rakonto”. La mondhistorio, inventita antaŭ du jarcentoj, resumeblas per tiu de la akiro de supereco de Eŭropo. La survojiĝo al multpoluseco percepteblas kiel ŝanco por antaŭeniri al vera universalismo. Sed ĝi vekas kelkfoje ankaŭ reflekson de timo en Okcidento: la mondo estus pli kaj pli minaca, „niaj valoroj” estus de ĉie atakataj, de Ĉinio, Rusio, la islamo; kaj necesus, sub la tegmento de la Nord-Atlantika Traktato-Organizaĵo (NATO) fari krucmiliton kontraŭ la barbaroj kiuj volas „nin detrui”. Tiu perspektivo, se ni ne antaŭzorgas kontraŭ ĝi, fariĝos memrealiga antaŭdiro.

Alain GRESH.

Elfrancigis Vilhelmo Lutermano

DEBATO

La forgesitaj virtoj de nemarkata aktivado

Kun granda unuapaĝa titolo « La kapitalismo en senespera situacio » The Economist (18-21 oktobro 2008) maltrankviliĝas pro la reveno de « ŝtatigoj » en la banka sektoro de la kapitalisma evoluinta mondo. La fama brita semajngazeto kaptas la okazon memori, ke de ĝia naskiĝo, lukto kontraŭ tiaj devojiĝoj estas ĝia ekzistokialo. En aparte longa ĉefartikolo, ĝi provas demonstri, ke tiu publika alproprigo, « por prava celo » (eligi la bankistojn el la vojsulkaj, kien ili falis) ne povos daŭri. Kun certa angoro, ĝi alvokas al subteno de la « grava intelekta batalo » por defendo de liberalismo kaj kontraŭ la « plebismaj argumentoj » ĉe la ĝusta nivelo. Kaj The Economist lanĉas tiun ideologian helpvokon: « La argumentoj favoraj al privatigoj en sansektoro, edukado, ekzemple, povas esti prezentataj kun malpli da konvinko, kaj ne akceptotaj ». Realisma diagnozo. En tiu ekonomi-konfuza epoko, maloftas voĉoj, kiuj konsilas ligi la pensifondusojn al la borso. La sistema krizo, kiu ŝancelas la mondan ekonomion, montras, ke revenigi publikajn servojn en la sinon de la privata sfero povas esti danĝere. Kontraŭe, la plivastigo de la nemarkata sfero refariĝas aktuala. En tia kunteksto, renovigi la konceptajn ilojn estas des pli urĝe. Revizitante Kejnzon (John Maynard Keynes) kaj Markson (Karl Marx), Jean-Marie Harribey provas malkonstrui la banaligitajn ideojn de liberalismo, kiajn « la merkata aktivado pagas la nemarkatan », aŭ « la konsumanto kreas la valoron ». Renversante tiujn donitaĵojn (alidirite, restarigante ilin surpiede) li montras, ekzemple, ke « la laboristoj de nemarkataj servoj produktas servojn, kiuj pagas ilin. » Ekonomio ne estas ludo kun nula sumo, kie tio, kion produktas unu estas prenita de alia. Kaj la sociigita riĉaĵo ne estas malpli riĉaĵo ol la privata, tute male.

de Jean-Marie HARRIBEY

Fone de financa krizo escepte profunda, ŝajnigante, ke nenio okazis, atako pluiras kontraŭ la publikaj servoj, la sociala protekto, la labor-juro, tio estas kontraŭ ĉiuj spacoj ĝis nun protektitaj kontraŭ la rentabilitato-deviĝo kaj profitobsedo, kaj kontraŭ ĉiu regulado generanta socian ligon kaj kolektivivan solidarecon¹. Bedaŭrinde socia ligilo kaj solidareco havas koston. Kiel do lukti kontraŭ la ideologia aserto laŭ kiu la « devigaj deprenoj » estus tro altaj (krom por rekapitalizi bankojn) kaj la publikaj aktivaj laŭdifine parazitaj (krom kiam ili okupiĝas pri savado de financoj)?

1 « Ni des pli daŭrigu la reformojn » ripetis la franca registaro post la parolado de s-ro Nicolas Sarkozy en Tulono la 25-an de septembro 2008.

Duobla senapelacia kondamno de la nemarkata sfero - tiu, kiu produktas servojn ne vendatajn merkatte, sed kies pago estas kolektiva, danke al impostoj kaj socialaj kotizoj - destinita malaperi aŭ ŝrumpi pro privatigoj, malpliigo de la ŝtatfunkciuloj kaj malaltiĝo de riĉulaj impostoj, tiu malaltiĝo oportune kreskigas la deficiton de la publikaj buĝetoj, por tiel pli bone malpravigi ilian celon. Por hundon dronigi oni nomas ĝin rabia: la nemarkata ekonomio estas prezentata kiel netolerebla ŝarĝo de la flatantoj de la neproduktiva, kaj eĉ kontraŭproduktiva, monda financo. Kaj la liberalismaj ekonomikistoj, voĉoj de siaj mastroj, ĉie ripetadas, ke 40,9 % averaĝa depreno en Eŭropunio estas tro, kaj ke 44 % en Francio estas pli ol tro.²

Necesas do refuti la kredon, tiom absurdan kiom kvazaŭuniversale disvastigitan, laŭ kiu la nemarkatan aktivadon finansas depreno el la merkata aktivado, kaj ke tiu lasta iĝas limigita, pro la tiel nomata forpelo-eŭfiko (la publika investado pelas la privat-an), kaj pro la altiĝo de la interezprocentoj. La normiga konsekvenco de tiu vidmaniero estas riglado de la monopolitiko, aparte malpermesante la 'monigon' de la publikaj deficitoj - tio estas per kreado de mono - do devigante la ŝtatojn prunti ĉe la financaj merkatoj. Tiaj estas la normoj deciditaj en Eŭropunio, de la traktato de Mastrohito ĝis la traktato de Lisbono, kaj la ĵus adoptitaj decidaj por fronti la financon krizon ne ŝanĝis aŭ rekonsideris ilin.

La unua moto de la alimondisma movado estis, antaŭ dek jaroj: « La mondo ne estas varo ». Subkomprenate « ĝi devas ne esti varo », dum ĉiuj nemarkataj servoj, aparte la publika edukado kaj la universala aliro al sanservoj, estas minacataj de kiam kapitalismo klopodas redukti ilian kampon por plivastigi tiun de la privata akumulado. Bedaŭrinde, hodiaŭ ekzistas neniu teoria tekstaro, kiu kapablas ŝiri la ideologian vualon de la liberalisma ekonomika retoriko.

Eĉ la tradicia marksisma teorio, kiu ne estas suspektinda kunlabori kun ties rivalo, malsukcesas, ĉar ĝi plejofte restas alroĉita al dogmo: la nemarkataj servoj estas finacataj per depreno el la plusvaloro produktita en la kapitalisma sektoro. Sekve la laboristojn de tiuj servoj oni deklaras neproduktivaj.³ Pensi en tiuj kondiĉoj la « malmerkatingon » estas neeble, ĉar la 'ne-varo' dependas de ekzisto de varo. Kaj solidareco inter la laboristoj de ambaŭ sferoj, tiel kontraŭmetitaj, estas treege neverŝajna.

Retrovi ligon kun malnovaj sed daŭre trafaj konceptoj, venantaj el Aristotelo, Markso kaj Kejnzo.

Unu el la dezirindaĵoj estas konstrui alternativan konceptan ilon. Por tio necesas sisteme malkonstrui la kutiman starpunkton, finfine kundividitan de tiom da liberalistoj, kiom de granda parto el la marksismaj pensuloj. Ĉar, malgraŭ ke la analizo de la varo-koncepto en la komenco de « La Kapitalo » donas ilaron por kritiki la merkatingon de la mondo, la tradicia marksismo lasis nezorgite tion, kio povus konsistigi remparon kontraŭ ĝi. Necesas do ellabori kritikan politikan ekonomikon, kiu celu teoriemi la nemarkatan sferon, vokatan etendiĝi iompostio, kiam la fortoritatoj turniĝas favore al laboro kontraŭ kapitalo.

2 Kritikon de tiu pozicio vidu: Syndicat national unifié des impôts (SNUI), *Quels impôts demain ? Etat de l'impôt et réformes fiscales* (Kiujn impostojn morgaŭ? Impost-stato kaj reformoj), Syllepse, Parizo, 2007; kaj « Les prélèvements obligatoires », *Les chroniques fiscales*, n-ro 1, Parizo, januaro 2008.

3 Eĉ André Gorz, kvankam kritikema rilate al tradicia marksismo, aliĝis al tiu vidmaniero; vd *Ecologica*, Galilée, Parizo, 2008, p. 127.

6 *Défense*, verko cit., p. 44.

7 <http://bostonreview.net/BR32.3/burns.html>

La unua etapo konsistas el montri, ke anstataŭ malfortigi ekonomion, nemerkata produktado aldonas al la merkata produktado. La Keynes-teorio jam montris, ke en situacio de senlaboreco, per la nura efiko de marĝena inklino konsumi⁴ malpli granda ol unu, la ŝtatintervenado ekigas obligan efikon des pli fortan, ke la enspezoj estas malaltaj. Ju pli malaltaj la enspezoj, des pli granda la proporcio elspezota kaj do des pli favora al aktivado. Trygve Haavelmo⁵ aldonis, ke tiu ŝtatintervenado estas favora, eĉ se la kroma publika elspezo estas farata kun ekvilibra buĝeto.⁶ Ĝis nun, ni ankoraŭ ne forigis la ideon, ke la financado de nemerkata aktivado devenas el depreno el frukto de merkata aktivado.

Por tion sukcesi, ni metu hipotezon, hodiaŭ nerealisman, sed kiu valoras por « ĉelima » rezonado, en dinamika perspektivo. Ni supozu, ke la nemerkata sfero iom post iom plivastiĝas, kaj ke oni pagas ĝiajn produktojn kaj servojn per impostoj. Se la proporcio de tiu sfero kreskus ĝis maksimumo, 100 %, ne eblus konsideri ke oni financas ĝin per depreno el merkata sfero, tiam malaperinta.

Logike refutinte la tezon, laŭ kiu kreskanta aktivado estas financata de alia, relative regresanta aktivado, oni ĝeneraligu tiun rezulton kaj konkludu la nevalidon de ĉiuj tezoj, kiuj konsideras la merkatan produktadon fonto, en donita momento kaj laŭ la tempo, de la nemerkata produktado. Sammaniere oni mezuras la malfortecon de la ekonomika kompreno en Sovetunio, kiu inkluzivis en la produktiva aktivado nur la materialan produkton, konsiderante, ke servoj ne partoprenas la produktadon.

Ja ne ekzistas en si mem produktiva eco de la laboro. Tiu eco estas difinita nur laŭ la ekzistantaj sociaj rilatoj. Necesas do trovi malnovajn sed daŭre trafajn konceptojn, bazitajn sur duobla distingo. Unue tiu difinita de Aristotelo inter uzvaloro (kapablo kontentigi bezonon) kaj interŝanĝvaloro (kapablo ebligi akumuladon): la unua estas riĉaĝo ne reduktebla al la dua.⁷ Poste la distingo farita de Markso inter ĝenerala laborprocezo kaj kapitalista laborprocezo; tio estas inter laboro produktanta uzvaloron kaj laboro produktanta negoceblan valoron, kaj plusvaloron por kapitalo.

Ja en ĉiuj nuntempaj kapitalismaj socioj kombiniĝas tri formoj de ekfunkciigo de produktivaj kapabloj. La unua, la ĉefa, koncernas la salajratan laboron, kiu rezultigas produkton de interŝanĝvaloro (merkataloro) destinita pligrandigi la kapitalon. La dua koncernas la salajritan laboron en la administracioj kiuj produktas uzvalorojn monajn kvankam ne merkatajn (edukado kaj publika sano). Ekzistas tria kategorio de homa aktivado, tiu de la endoma sfero aŭ la asocia kampo, kies produktoj estas nemonaj. Nia ĉi-tiea tezo estas, ke la du lastaj ne naskiĝis per subtraho de la produkto de la unua, nek de tiu de la sendependaj laboruloj.⁸

4 Estas la konsumota parto de aldona enspezo.

5 Norvega ekonomikisto, ricevis Nobel-premion pri ekonomiko en 1989.

6 Trygve Haavelmo, « Multipliers effects of a balanced budget », *Econometrica*, vol. 13, Nov-Jorko, oktobro 1945, p.311-318.

7 Aristotelo, *Les Politiques* vol. 1, Flammarion, Parizo, 1993. Por prilumado de tiuj demandoj, vd ATTAC *Le Petit Alter Dictionnaire altermondialiste*, Mille et une nuits, Parizo, 2006.

8 La fakto, ke la gajno de produktiveco estas ĝenerale pli malforta en la servoj, ĉu merkataj, ĉu nemerkataj, - aparte la servoj ĉe personoj - ol en industrio, ne devas esti konfuzita kun la eco mem de produktiveco. Tiun konfuzon implicite faras, laŭ ni, A. Gorz, verko cit. p. 149.

Ni revenu al Markso, sed ankaŭ al John Maynard Keynes, ĝeneraligante lian anticipo-koncepton. La privataj entreprenoj decidigas produkti kiam ili ektrovas por siaj varoj vendeblecon respondantan al pagokapablaj bezonoj. Ili tiam investas kaj cirkuligas salajrojn. Surmerkata vendo validigas tiun anticipon, dum misvendo negative sankcius ĝin. La publikaj administracioj, siaflanke, antaŭvidante kolektivajn bezonojn, faras publikajn investojn kaj ankaŭ disdonas salajrojn. La validigo tiam okazas "antaŭfakte" per kolektiva decido, kaj ne plu distingebles de la anticipado.

En ambaŭ kazoj enmeto de mono, en formo de salajroj kaj privataj kaj publikaj investoj, lanĉas la ekonomian maŝinon kaj generas produktadon de privataj merkataj varoj kaj de publikaj nemerkataj produktoj. Same kiel la salajroj estos poste elspezitaj por aĉeti la merkatajn produktojn, la impostpagado venas, post produktado de la kolektivaj servoj, esprimi la konsenton de la loĝantaro, por ke la edukado, sekureco, justico kaj la administraj taskoj estu daŭre produktataj. Anticipado de nemerkataj servoj kaj ilia produktado fare de la laboristoj de la publikaj administrejoj venas do logike antaŭ ties kolektiva « pago » fare de la servo-uzantoj.

Kerna argumento por resendi la liberalisman diskurson al la muzeo de ideologioj

Trompa estas la esprimo « la impostoj financas la publikajn elspezojn ». Ambigueco venas de la konfuzo inter financado kaj pago. La kapitalista produktado estas financata per antaŭpago de kapitaloj en investado kaj salajroj, antaŭpago, kies kreskon ekonomie ebligas monkreado; kaj la konsumantoj pagas ĝin. Kiel rolas imposto rilate la nemerkatan produktadon? Ĝi estas ĝia sociigita pagado. La impostpaganto ne « financas » lernejojn aŭ hospitalojn, same kiel la aŭto-aĉetanto ne « financas » la aŭtomobilajn muntadĉenojn. Ĉar financado venas antaŭ la produktado, ĉu ĝi estas merkata aŭ nemerkata. Kaj la pagado, privata aŭ sociigita, venas poste. Finfine, la kroma produktiva aktivado generas enspezojn, kaj sekve kroman ŝparadon, kiu venas alĝustiĝi al la ĝin ekiginta investado, same privata kiel publika.

Necesas do alporti logikan respondon al problemo de logiko: ĉar la kapitalisma ekonomio estas mona ekonomio, ĉu eblus depreni el bazo ankoraŭ ne produktita kaj kiu eĉ devus esti la rezulto de tiuj deprenoj? Ĉar tio estas logike ne ebla, ni devas renversi la rezonadon: la nemerkata produktado kaj la monaj enspezoj, kiuj ĝin respondas, antaŭas la deprenojn. Alidirite, kaj tio estas kerna argumento por resendi al la muzeo de la ideologioj la liberalisman retorikon, la laboristoj de la nemerkataj servoj produktas la enspezojn, kiuj pagas ilin.

Ja, la impostpagado ebligas – same kiel la privataj aĉetoj de la konsumantoj – ke la produktad-ciklo reproduktiĝas de periodo al alia. Sed du aferoj estas mispensitaj en la liberalisma ideologio. Unue, la laboristoj de la kapitalisma sektoro – kaj ne la konsumantoj – ja kreas la monan valoron, el kiu parton akaparos la kapitalistoj, kaj la laboristoj de la nemerkata sektoro – kaj ne la impostpagantoj – kreas la monan valoron de la nemerkataj servoj. Due, laŭ propra senco, ne figure, financado signifas la necesan monan impulson por la kapitalisma produktado kaj la nemerkata produktado; la monan impulson oni do devas distingi de la pagado.

Ekonomia analizo havas sencon nur se oni konsideras ĝin en la kapitalismaj sociaj rilatoj

Male al dominanta opinio, la publikaj servoj do ne estas provizitaj el subtraho el io jam ekzistanta. Ilia mona sed nemerkata valoro ne estas eltirita kaj deturnita, ĝi estas produktita. Tiam, diri ke la publika investo pelas la privatan investon estas same kiel diri, ke investo de Renault-firmao pelas la investon de PSA-Peugeot-Citroen aŭ de Veolia. Aserti, ke la salajroj de ŝtatfunkciuloj estas pagataj danke al depreno el enspezoj venantaj de la nura privata aktivado ne pli signifas ol diri, ke la salajroj de la privata sektoro estas pagataj danke al depreno el la konsumantoj. Tio estas ignori ke la kapitalisma ekonomio estas cirkvito, kies du fondaj agoj estas la privata investdecido por produkti merkatajn varojn kaj servojn, kaj la publika investdecido por disponigi nemerkatajn servojn. Alidirite, la « devigaj deprenoj » estas farataj el malneta interna produkto (MIP) jam enhavanta la rezulton de la nemerkata aktivado.

Nu, ĉar la imposto ne estas depreno el jam ekzistanta riĉaĝo, sed la sociigita prezo de kroma riĉaĝo, ne plu eblas kontentiĝi per la banala nocio de « depreno » el la merkata produkto (en la liberalisma lingvaĵo) aŭ el la kapitalista plusvaloro (en marksismaj terminoj). Jes ja la laboro kaj resursoj asignitaj por tiu aktivado ne plu disponeblas por alia. Sed estas neniu kialo supozu, ke la laboro asignita por unu vivigas la alian. La homaj bezonoj estas kontentigataj de materialaj aŭ nematerialaj uzvaloroj, produktitaj sub aŭtoritato de la kapitalo aŭ de kolektivaĵo. La fakto, ke iujn uzvalorojn oni ricevas nur pere de la kapitalo, kiu tiuokaze valorigas, ne implicas ke la merkata aktivado naskas la nemerkatan. Ankaŭ ne, ke la nemerkata mona valoro estas inkluzivita en la merkata mona valoro, kio estas nepre en la tradicia vidmaniero.

Ĉi-rilate, la fakto, ke la kontistoj de la Landa Librotenado registras la publikajn elspezojn kiel konsumiĝojn ne devas trompi nin. Unuflanke, oni ĉi tie analizas la netan publikan elspezon de infrastrukturoj, ekipaĵoj kaj peraj konsumiĝoj, elspezon mezuratan laŭ la pagitaj salajroj, kiu do konsistigas la kompensadon de nova produktado de uzvaloro. Aliflanke, estas neniu kialo trakti malsame la antaŭpagon por la salajroj fare de la privataj entreprenoj kaj tiun faritan de la publikaj administracioj, ĉar ambaŭkaze temas pri « elspezo » de la dunganto. Ĉiu produktado havas kostojn – estas evidentaĵo – kaj tiu diskurso, kiu forgesus ĝin, estus senlogika. Gravas distingi inter tiuj kiuj ebligas laboron produktantan plusvaloron por la kapitalo, validigitan de la merkato, kaj tiuj, kiuj ebligas laboron produktantan uzvalorojn, kies validigo dependas de kolektiva demokratia decido.

Ĉe tiu stadio, la ekonomia analizo havas sencon nur se ĝi estas konsiderata ene de la sociaj rilatoj, kerno de la kompreno de kapitalismo. La riĉuloj volas malpli da impostoj, ĉar ili ne volas pagi por la malriĉuloj. La mona politiko estas riglita de la Eŭropa Centra Banko (ECB) kaj de la eŭropaj traktatoj, kiuj malpermesas al la ŝtatoj deprunti ĉe ĝi por financi⁹ la publikajn elspezojn, tio estas antaŭpago ilin. La rolo de « lastinstanca pruntisto » de la ECB estas ŝlosita, por ke la rolo de « lastinstanca aĉetanto » (de ekipaĵo kaj de laboro) plenumata de la ŝtatoj estu limigita. La liberalisma ideologio malŝategas ke monkreado financas produktadon, kiu ne donas profiton. Krom se la ŝtato kompensas sian deficiton depruntante ĉe la kapitalistoj, kiuj mem disponas pri facila banka kredito, por poste alprunti. Tiel en Francio, sumo egala al pli ol 80 % de la imposto pri enspezaro estas uzata por

9 Ĉi tie ni plu tenas la distingon inter financi kaj pagi.

pagi interezojn al pruntistoj. Oni do facile komprenas, kial la mona politiko, kiu estas ekster publika regado, konsistas nur el kontroli la inflacio-ritmon: ne nur protekti la financon renton gravas por la posedantoj de financaj valorpaperoj, sed oni ankaŭ evitu favorigi nemerkatan produktadon de uzvaloroj ne alireblaj por la kapitalo.¹⁰

La nemerkata riĉaĝo sekve ne estas depreno el la merkata aktivado, ĝi estas « pluso » devenanta de publika decido uzi laborfortojn kaj ekipaĵojn, disponeblajn aŭ prenitajn el lukro. Tiu riĉaĝo estas double sociigita: per la decido kolektive uzi produktokapablojn kaj per la decido socie dismeti la pagoŝarĝon. Netolereble por la burĝa imago, aparte por la novliberalisma doktrino.

Klarigo de la enigmo de la nemerkata produktado partoprenas en la redifino de riĉo kaj valoro, nepre necesa por endigi la merkatingo-procezon de nia socio. La liberalisma teorio konfuzas riĉon kaj valoron, kaj la teorioj malamikaj al kapitalismo ne restu obsedataj de la fakto, ke tiu sistemo tendencas redukti valoron je tiu asignita al kapitalo. Sur tiu ĉi kampo, kritika reekzameno de la kategorioj tradicie uzataj de politika ekonomiko kaj de marksismo estas nemalhavebla por proponi politikan ekonomikon de « senmerkatingo ». Resume, forigi ekonomian liberalismon kaj certan marksismon, por reveni al tiu Markso, kiu difinis valoron kiel « la socian karakteron de laboro, se ja laboro ekzistas kiel elspezo de laborforto 'socia' »¹¹. La rekono de la laboro farita por kontentigi sociajn bezonojn ekster la merkata kampo, partoprenas en la socia mastriĝo pri tio, kio estas la bonfarto, la « vera » riĉaĝo [12].¹² Kaj la sociigita riĉaĝo ne estas malpli riĉaĝo ol la privata, male...

Jean-Marie HARRIBEY

Elfrancigita de Jeanne-Marie Cash

Ĉe Monda Asembleo Socia (MAS)

- C. F. Ramuz: Aline (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), 2007

- Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible, en trad. de V. Lutermano, 2007

- Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), en traduko de V. Lutermano, 2007

- Kubaj infanrakontoj, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Diemel Pereyra, 2007

- GBEGLO Koffi: Esperantujismo, originale en Esperanto, 2008

- Johano Besada: Eseoj, orig., 2008

- Karlo Markso hodiaŭ, citaĵoj, 2008

10 Por pli kompleta informado, vd « Les chemins tortueux de l'orthodoxie économique ».

11 Karl Marx, « Notes critiques sur le *Traité d'Économie Politique* d'Adolf Wagner », 1880, en *Oeuvres*, Gallimard, kol. « Bibliothèque de la Pléiade », vol. 2, Parizo, 1968, p.1550.

12 El tiu vidpunkto, ni plene konsentas kun la titolo de la lasta ĉapitro de la libro citita de A. Gorz, « Richesse sans valeur, valeur sans richesse ». Vd ankaŭ *L'Économie économe* (la ŝparema ekonomio), L'Harmattan, Parizo, 2000, kaj « Quand le sage montre la lune, le fou regarde le doigt. Quelques propositions pour contribuer au débat sur la richesse », 2008.